



Antaŭ jarcento forpasis la iniciatinto

Ludoviko Zamenhof kaj liaj ligoj kun Britio

- 4 • Drondo**
Sam Poynter
- 5 • Lernu kaj Postplu**
Christopher Lewis
- 9 • Buchanan-Majstroklaso**
- 10 • Lanterna festivalo**
- 11 • Londona Lingva Ekspozicio**
- 11 • Memormuro**
Simone Davis
- 12 • Lingva Festivalo en Sheffield**
- 13 • Esperanta radiodefio**
Anna Lowenstein
- 14 • Junularo en Bath**
Ariel Bonkorpa
- 17 • Kiu kiuas?**
*Damon Lord,
Kat Newbould*
- 21 • Afrik'-Amik'**
Malcolm Jones
- 23 • Filozofoj kaj busservo**
Jack Warren
- 27 • Roterdamon, timbalcele**
Andreo Marshall
- 29 • Kiu kiuas?**
pri L. L. Zamenhof
- 38 • Mirinda anaso**
Ian Carter
- 39 • Momentoj de pasero**
Jack Edwards
- 40 • Recenzoj: Bridge of Words; La vilaĝo, al kiu blovas la vento; La danĝera lingvo**
- 41 • Literdoku**
Ian Carter
- 46 • La verda krokodilo**
Carys Goldy
- 52 • Nekrologoj: Grietje Buttinger, Muriel Shackleton, Katelina Halo**
- 57 • Strangaj kuraĝuloj**
- 58 • Perpoŝte**

redaktis: **Ian Carter, Tim Owen**

ian.carter@esperanto.org.uk

tim.owen@esperanto.org.uk

eldonis: **Esperanto-Asocio de Britio**

eab@esperanto.org.uk

Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE

telefone: +44 (0)1782 372141

aŭ en Britio: 0845 230 1887

fakse: 01782 372393

retejo: **esperanto.org.uk/lbe**

ISSN 0007-067X

fasonis: Ava Rowell

enpaĝigis: Simon Davies

presis: Panda Press

La Brita Esperantisto kaj EAB Update estas eldonataj entute ses fojojn jare. Artikoloj esprimas nur la opinion de sia aŭtoro kaj ne nepre ian oficialan starpunkton de EAB. Nemembroj povas aĉeti LBE de la EAB-libroservo en Barlastono.

Ni normale ne akceptas paperajn kontribuojn.

Kontribuoj estu sendataj elektronike kiel ODT, DOC(X), RTF, aŭ plata teksto.

Fotoj estu memstaraj kunsendaĵoj, apartaj de la akompana teksto.

Originalaj fotoj en LBE ne estu represitaj en aliaj publikaĵoj, ĉu paperaj, ĉu elektronikaj, sen permeso de la redakcio de LBE kaj ĉiaokaze sen fontindiko.

limdato por la aŭtuna numero:

31 aŭgusto 2017

BONVENON al nia printempa numero, eldono verŝajne pli dika ol iam antaŭe. Ni esperas, ke plaĉos al vi ĉio, kion ni amasigis.

Ĉi tiu ekzemplero atingos vin en aprilo 2017, monato tre grava por Esperanto. Se vi ne jam sciis, pro la kovrilo vi sendube nun komprenas la kialon. Antaŭ 100 jaroj, la 14-an de aprilo 1917, mortis la homo, kiu donacis Esperanton al la mondo, Ludoviko Zamenhof.

Ni ne provis doni la tutan vivrakonton de tiu pionira idealisto; tion ne eblus fari eĉ en nekutime dika numero. Ĉiuokaze, aliaj jam bone plenumis la taskon, inkluzive de nia propra Marjorie Boulton, kies biografion pri li vi baldaŭ povos aĉeti en renovigita versio. Kion ni elektis fari anstataŭe estis iom prezenti Zamenhofon, sed precipe paroli pri liaj rilatoj kun ĉi tiu insularo. Ni esperas, ke eĉ la plej spertaj inter vi lernos ion novan pri la inventinto de la lingvo, kiun ni ĉiuj elektis lerni, kaj kiu estiĝis kun unusola parolanto, kiu multe oferis por sukcesigi ĝin.

Kaj ni esperas, ke multaj el vi festos la lingvon en Edinburgo ĉe la Kunkongreso. Bele estas por ni konstati, ke pluraj el niaj novuloj frue aliĝis. Agrablan legadon kaj (kun-)kongresumadon! ■

La majstro mortis

*Ne estis mi tie,
preĝante plorpie:
katenis min sklave Siberio.*

*La famon ne brue,
nur poste, malfrue,
simile al eĥo de mortkrio
mallonga sciigo alportis:
“La Majstro mortis!”*

*Sed scias mi sente,
ke oni sensente
plezurojn pelante babiladis,
eĉ kiam plorante
la ĉerkon portante
amaso funebra trapaŝadis.
Mallonga sciigo alportis:
“La Majstro mortis!”*

*Por ili, jen homo,
eĉ malpli – nur nomo
sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko ...
Por ni, funebrantoj,
por pacbatalantoj
ĝi gardas kreinton de mondverko.
Mallonga sciigo alportis:
“La Majstro mortis!”*

Verkis tiun poemon **Julio Baghy**, kiu mortis en 1967, antaŭ 50 jaroj. La jaro de la jubileo por Zamenhof ankaŭ do estas jubilea por li.

La kovrilan bildon de Zamenhof desegnis John Hartley en 1941.

MI MALOFTE vizitas Londonon, ĉar tio postulas almenaŭ duhoran trajnvojaĝon de tie, kie mi loĝas en suda Kimrio, kaj ampleksan porcion el mia poŝmono. Sed tiun grizan oktobran sabaton, io sukcese logis min al nia fierinda ĉefurbo: la promeso de amika etoso, vigla diskutado, kaj la feliĉa barba vizaĝo de nia kara rondestro Tim Owen.

Pro londona drondo mi vojaĝis. *Drondo* estas, laŭ la retejo, paroliga diskutrondo por studentoj de Esperanto. Tamen ne ĉiuj el ni estis lernantoj, ĉar ankaŭ spertaj esperantistoj ŝajne avidas la ŝancon

Pasintan oktobron EAB revenis al Londono por plia ekzemplo de sia serio *Drondo*, kiu celas paroligi kaj diskutigi homojn nur en Esperanto.

Sam Poynter ĉeestis sian unuan ...

grupe interparoladi, kaj do mi estis renkontiĝonta kun Marteno Miniĥ, Kat Newbould, Anica Page, Terry Page kaj Mikaelo Sims, krom la antaŭmenciita Tim.

Kaj, profunde en la kuniklejeca hejmo de la YMCA-klubo en Great Russell Street, ni diskutemaj esperantistoj kolektiĝis por pritrakti la temojn, kiujn Tim jam elektis por ni, kaj pri kiuj notoj elŝuteblis de la retejo. Kutime diskutiĝas temoj aktualaj, kaj la lastatempa referendumo decido, ke



Partoprenis *Postplu* Christopher Lewis, Sam Poynter, Kat Newbould, Ali Mecham, Taggart King, Kelly Payne, Martin S Taylor kaj Simone Davis.

POSTPLU estis kurso por tiuj, kiuj jam finis la kursojn *Lernu* kaj *Lernu Plu*, do ni ĉiuj estis progresantoj kun iom da scio sed malmulta parola sperto. La kurso celis meti nin en situacion, kie ni povos paroli pri diversaj temoj inter similnivelaj

amikoj, kiel ĉe la drondo, sed kun nur la leĝeraj temoj kaj kun fojfojaj gramatikaj klarigoj.

Ni parolis pri miskomprenoj, kaj lingvaj kaj kulturaj, kaj multaj progresantoj disdonis tre amuzajn rakontojn. Ni aŭdis pri imagaj

Britio eliru el la Eŭropa Unio invitis profundan diskutadon. Bestoj provizis riĉan trezoron por preparolado: ni diskutis niajn rilatojn kun ili, interŝanĝante opiniojn pri ĉasado, bredado kaj eksperimentado, sed ankaŭ niajn sintenojn al hundoj, katoj kaj aliaj dorlotbestoj. Kaj la idealan flankon ni traktis per diskutado pri niaj propraj Edenoj, deklaroj pri tio, kian mondon ni plej dezirus vidi.

Unue, tamen, ni preparolis fotojn. Laŭ ordonoj de Majoro Tim, ni ĉiuj kunportis bildon, kiun ni opinias ikona. Mi elektis foton de la murigita landlimo inter Usono kaj Meksiko, ĉar la tiamaj novaĵoj ofte temis pri prezidenta kandidato Trump kaj lia konstruotaĵo. Kiel absurda lia kandidatiĝo tiam ŝajnis... La aliaj

partoprenantoj kunportis bildojn pri la truo en la arkta ozontavolo, la vido de la kosmoteleskopo Hubble, Che Guevara, kaj balenkaptado, kiujn unu post la alia ni preparolis.

La horoj tro rapide forflugis. Mi tre ĝuis la okazaĵon: mi ne nur lernis pri Esperanto sed ankaŭ pri aktualaj aferoj kaj pri la opinioj de samideanoj kaj ne-tiom-samideanoj. Je kosto de nur £10, mi nepre rekomendas drondon al iu ajn, kiu volas plibonigi sian parolkapablon, aŭ simple ĝui interesan diskutadon en bonan etoson. Eble mi vidos vin ĉe la venonta! ■

Sam Poynter eklernis Esperanton antaŭ 22 jaroj kiel adoleskanto kaj, kiel adoleskanto, preskaŭ tuj ekokupiĝis pri aliaj interesoj. La lingvo revekiĝis en ŝi 20 jarojn poste, danke al *Duolingo* kaj la *YouTube*-filmetoj de Evildea, do ŝi tiam partoprenis la kurson *Lernu Plu* por nutri tiun fajreron. Sam laŭprofesie estas datenanalizisto kaj loĝas en suda Kimrio kun sia koramiko, ilia kato, kaj senĉese kreskanta aro da tenduma ekipaĵo.

regionoj, strangaj proponoj kaj aliaj miskomprenoj pro lingvaj problemoj. Ĉefe ni diskutis en la sekva temo la novan prezidanton de Usono, revizitante la tutan vojaĝon de flanka ŝerckandidato ĝis la plej potenca homo en la mondo, kaj rakontis pri liaj unuaj du monatoj en la posteno. (Ĉu nur tiom mallonge?!)

Ni intencis paroli pri liaj konataj aĉaĵoj kaj pri liaj bonaj agoj, sed bedaŭrinde ne havis tempon eĉ komenci la duan parton, tiom multaj estis la unuaj. Sekvis tion diskutado pri famaj fotoj, kiujn elektis antaŭ la kurso la

partoprenantoj.

Post la kurso ni renkontis londonajn esperantistojn en loka drinkejo. Tio donis al ni la eblon uzi niajn plifortigitajn Esperanto-kapablojn en verviva situacio. Ni ankaŭ vidis la uzadon de la apo *Amikumu*, vidante la alvenojn de kelkaj Esperantistoj. Unu komencanto, kiun ni ne konis, eĉ trovis nin per ĝi! Eĉ mi, kiu iomete timas tre novajn teknikojn, estis impresita!

Entute, la tago estis kaj utila kaj ĝuinda, kaj mi pensas, ke ni progresantoj antaŭĝuas la sekvan eblon plu lerni pri Esperanto. ■

Inter eldonoj de *La Brita Esperantisto*, EAB starigis pliajn sesiojn de sia kursaro *Lernu* (en oktobro kaj marto) kaj okazigis en Londono la 18-an de marto provan kurson *Postplu* por progresantoj.

Mi ĵus pasigis bonegan tagparon ĉe la sidejo de EAB ĉe la kurso *Lernu Plu*. Instruis min Tim Morley, tre lerta kaj entuziasma instruisto kaj gvidisto. Jen bela lernloko, kie oni staras ĝisgenue en libroj kaj antikvaj kaj modernaj, kaj ĉirkaŭas treege subtena etoso kreita de Tim Owen kaj Viv O'Dunne, kiuj nin ĉiujn prizorgis.

Mi rekomendas al vi ĉiuj, ke se la okazo prezentos sin al vi, mendi lokon ĉe la venonta sesio de *Lernu Plu*, ĉar ĝi faros grandan ŝanĝon al via memfido ... kaj venontan semajnfinojn mi iros al Londono por *Postplu*!

Jen komento de **Taggart King** ĉe la *Facebook*-grupo por homoj, kiuj lernas Esperanton per *Duolingo*. Taggart estas diligenta studento kaj nur eklernis lastatempe. *Lernu Plu* donis al li lian unuan okazon renkonti aliajn Esperanto-lernantojn kaj -parolantojn.



Partoprenantoj de *Lernu* kaj *Lernu Plu* en Barlastono en marto: Sammy Kennedy, Liz Tuckwell, Tim Morley, Ali Mecham, Stephen Picksley, Neil Payne, Lynne Markey, Adam Hall, Andy Davis, Steven Medgyesy, Tim Owen, Tony Price, Taggart King, Christos Bohoris, Anna Adamopoulou, Simone Davis.

Mi ĉeestis la kurson *Lernu Plu* kaj mi sentas vologon esprimi grandegan dankon al ĉiuj partoprenintoj. Mi amis ĉiun minuton ĉe *Esperanto-Domo* kaj sentas, ke mi lernis multe. Ambaŭ la “Timoj” kaj Viv estas tiom mirindaj kaj entuziasmaj, kaj la lecionoj estis diversaj kaj amuzaj. Estis mirinde aŭdi Esperanton parolatan dum du tagoj!

Mi sentas, ke mi faris multajn novajn geamikojn, kaj mi esperas, ke ni daŭrigos la kontakton. Mi forlasis la kurson kun pli profunda amo por Esperanto, ol kiam mi alvenis, kaj mi antaŭĝuas partopreni en la venonta kurso, *Postplu*.

Ali Mecham

Mi devas diri, ke estis bonega sperto por mi hodiaŭ je la kurso *Postplu* en Londono. La enhavo de la kurso estis kaj malfacila kaj efika, sed ne tiom malfacila, ke mi sentis min perdita. Mi ne povis kredi la manieron, en kiu ni povis uzi la lingvon tiel facile kaj flue. Nekredeble.

Kaj en la vespero ĉe la drinkejo mi tre ĝuis renkonti realajn eksterlandanajn esperantistojn. Mi estis tre surprizita ekscii, ke mi povas kaj kompreni kaj esti komprenata. Ĉi tio estis tiom kontentiga sperto por mi kaj estis precize la kialo, pro kiu mi volis lerni Esperanton.

Kia bonega tago!

Taggart King

Mi nervozis antaŭ ol ĉeesti *Lernu Plu* la 11-an kaj 12-an de marto. Fininte la *Duolingo*-kurson mi devis demandi min, ĉu mi sufiĉe progresis por fari ĉi tiun kurson anstataŭ partopreni la pli baznivelan *Lernu*? Verŝajne mi ne estis la sola, kiu havis tiajn maltrankvilojn. Sed mi ne devintus maltrankviliĝi ...


La du instruistoj kaj ĉiuj lernantoj ĉe la kursoj estis tre afablaj, bonvenigantaj, kaj dezirantaj disdoni siajn sciojn kun aliaj. Ni ĉiuj multe ĝuis la semajnfinojn, kaj revenis hejmen kun pligrandigita amo por Esperanto kaj nova entuziasmo ... kaj eĉ iom pli: mi akiris malnovan ekzemplon de la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Kiel ĉe multaj malnovaj libroj, ŝajnas, ke ĉi tiu vortaro havas interesan historion. Sur paĝo de la libro mi trovis ĉi tiun enskribaĵon:

Al mia amikino Kate, okaze de ŝia translokiĝo al Oksfordo, 27-an de Februaro 1986. Vivu longe kaj feliĉe kaj multe uzu ĉi tiun libron! — Marjorie

Do, la libro estis donaco de Marjorie Boulton al Kate Hall [vidu p. 54] – ambaŭ famaj anglaj esperantistoj kaj, kiel mi, Oksfordanoj. Mi fiere tenas en miaj manoj pecon de la historio de la brita esperantismo!

Koregan dankon al la du Timoj (Owen kaj Morley – kiujn cetere neniu fakte timu), al Viv O’Dunne, kaj al ĉiuj, kiuj faris *Lernu* kaj *Lernu Plu* tiel sukcesaj.

Tony Price, emeritiĝinta paroĥestro, lernis Esperanton per *Duolingo* kaj tiom multe ekinteresiĝis, ke li fariĝis la unua homo, kiu registriĝis por la kunkongreso en Edinburgo.



Al mia amikino Kate,
okaze de ŝia translokiĝo al
Oksfordo, 27-an de Februaro 1986
Vivu longe kaj feliĉe kaj
multe uzu ĉi tiun libron!
Marjorie

Frazumado kaj fakularo



LA UNIVERSITATO de Liverpolo, jam okaziginte la Buchanan-Majstroklason tuj antaŭ la Brita Kongreso, plie ofertis Esperanton en oktobro, kiam ĝi prezentis vespere je la 20-a la Buchanan-

prelegon. Ĉeestis dudeko da homoj, inkluzive de jamaj esperantistoj, lokaj studentoj, kaj fakularo.

Ĉefprelegis profesorino Sabine Fiedler (en la foto) de la Universitato de Lepsiko (Leipzig) pri “frazumado kiel kultura spegulo”, donante ekzemplojn en Esperanto, la angla kaj la germana.

Poste la Buchanan-lekciisto, profesoro Wim Jansen de la Universitato de Amsterdamo montris, kiel Esperanto povus servi kiel kompreniga pordo al malpli konataj kulturoj. En sia prelego li uzis Esperanton por doni klarigajn signifojn al frazoj kaj proverboj el la eŭska, kiujn klarigi per la angla apenaŭ eblus. ■



AMBAŬ FOTOJ: PEETER AATAI

Lanterna festivalo



Ali Mecham, nove lerninte Esperanton interrete, voluntulas ĉe la budo de EAB.

INVITIGIS EAB al lingva festivalo en la urba biblioteko de Nottingham la 18-an de marto. La aranĝon organizis lokaj studentoj, kiuj starigas entreprenon *Lantern*, kies celo estas helpi al nove alvenintaj rifuĝintoj lerni la anglan. Inviton ricevis EAB, ĉar unu el la fondintoj konas nin post nia invito al ŝi kadre de alia projekto ĉeesti nian kurson *Lernu* lastan jaron.

Deĵoris ĉe la budo Tim Owen, kun helpo de lokulo Ali Mecham, kiu komencis lerni Esperanton antaŭ ses monatoj per *Duolingo*. Ali lastatempe ricevas lecionojn de Damon Lord per skajpo kaj ĉeestas la kunvenojn de la *meetup*-grupo en Birmingham. La rezulto tre plaĉas, ĉar Ali kapablis esprimi sin sufiĉe senpene, kio bele helpis videbligi al

aliaj ĉe la aranĝo, ke Esperanto estas vera lingvo.

Post la finiĝo de sukcesa tago, dum kiu oni havis la okazon lerni pri lingvoj, gustumi manĝaĵon de aliaj kulturoj, kaj aŭskulti poezion, la organizantoj petis al Tim, ke li restu por intervjuo, dum kiu li laŭtlegis la poemon *Al la Juda Foririnto* de Leen Deij.

Poste riceviĝis dankletero de la ĉef-organizanto, kiu klarigis la komunajn ligilojn, ke “ĉe *Lantern* ni daŭre strebas por plibonigi la interkompreniĝon inter societoj kaj komunumaj grupoj en la urbo, por konstrui kunlaboradon, kaj por plibonigi sinkomprenon inter kulturoj.”

Ni deziru al tiuj inspirigaj gejunuloj sukceson! ■

Gustumsesio



OKAZIS de la 14-a ĝis la 16-a de oktobro la ĉiujara Lingva Ekspozicio en Londono.


EAB aranĝis, ke aperu publika gustumsesio pri Esperanto, kaj afable konsentis prezenti ĝin Tim Morley (fotita), kiu raportas, ke ĉeestis ĝis 50 homoj, precipe junuloj. ■

Memormuro

Simone Davis

LA LASTAN 11-an de novembro ĉe University College Schools en Londono laŭtleĝiĝis la nomoj de la ekslernantoj, kiuj pereis en 1916 dum la Unua Mondmilito. Inter tiuj estis la nomo de Harold Bolingbroke Mudie, pioniro de Esperanto en Britio, kaj kies nomo videblas gravurita sur la memoriga muro.

Dankas mia edzo, kiu traktis Esperanton kaj Mudie en posta matena kunvenigo, pro la interesa tem-ideo. ■



Simone Davis eklernis Esperanton per *Duolingo* kaj ĉeestis sesion de *Lernu Plu*, kie ŝi aŭskultis kaj ŝajne tre bone enkapigis prelegon pri Harold Bolingbroke Mudie. Ŝi daŭre lernas Esperanton kaj aktive partoprenas en la grupo ĉe *Facebook* por duolinganoj.

Ĉiuj lingvoj samvaloras

STARIGIS denove la Komitato por Internaciaj Studentoj ĉe la Universitato de Sheffield sian ĉiujaran Internacian Lingvan Festivalon. Kiel en la lastaj jaroj, EAB finance subtenis la eventon, kie eblis ĉeesti gustumsesiojn pri dudeko da lingvoj, inkluzive de la japana, la luksemburga, la tamila, kaj la persa.



Ian Carter kun Santhana Gopala-krishnan, la prezidanto de la Komitato por Internaciaj Studentoj, kaj Ana-Gabriela Popa, dungito pri internaciaj studentoj.

Kiel tradicie, tiun 23-an de oktobro ankaŭ videbliĝis Esperanto, kiun prezentis plurfoje Ian Carter kaj Tim Owen. Plie ĝi videbliĝis, ĉar la vorto denove elstaras sur la jakoj, kiujn surhavas la komitatanoj. ■

Dear Tim and colleagues from Esperanto Asocio de Britio,

Since 2011, when the first International Languages Festival took place in Sheffield, up to its 7th Edition, now, on 23rd of October 2016, Esperanto Association of Britain has always supported and stood by our side.

I have been involved in the organisation of this Festival since my first year of university in 2013 up to today as International Students' Officer, and I would like to express my deepest thank you for all your help throughout these years.

The International Students' Committee and I value very much this event, not only for the educational benefits it brings – helping people of all backgrounds learn the basics of a new language, expanding their curiosity and developing their cultural agility – but also for its message: that all languages are equal in value, that they celebrate our diversity in communication, that they fascinate and bring people together.

Every year Esperanto has supported us to organize and deliver this event, of which we are very proud because it delves into our very own #WeAreInternational identity of global citizens. We could not have done it without your support. So, we thank you from our hearts and we hope that this collaboration and level of support will continue in following years. It was my pleasure to meet you and work with you.

Dankon!

Bonan tagon al vi!

Ana-Gabriela Popa,

International Students' Officer,

Sheffield Students' Union

Dankletero ricevita pro la subteno de EAB, precipe ĉar la mesaĝo de la aranĝo estas, ke “ĉiuj lingvoj samvaloras”.



SU
Officers



MI RENKONTIS Paul Ross, prezentiston de la “matenmanĝa” programo ĉe *talkRADIO* kaj cetere tre konatan prezentiston kaj ĵurnaliston. Li kompletigas “defion” ĉiusemajne, kaj en tiu semajno celis lerni Esperanton, kaj do tiel kontaktis EAB. Do, unu grizan matenon mi vojaĝis por instrui lin.

Mi donacis al li plurajn belajn revuojn, kaj la lernolibron de Stano Marček, kiun mi ricevis ĝustatempe de EAB. Akceptante ĝin, li diris, ke li certe portos ĝin dum kelkaj vesperoj al la lito! Li intervjuis min dum 7–8 minutoj, kaj mi pensas, ke mi sukcesis doni sufiĉe bonan impreson.

La intervjuo estis dissendita nur ĉirkaŭ la fino de tiu semajno, kaj intertempe li supozeble studetis Esperanton. Ĉar li faras kvarhoran novaĵprogramon ĉiumatene, mi imagas, ke li ne havas multan

Anna Lowenstein havis nekutiman taskon februarfine: instrui Esperanton al ĵurnalistoj, kiu priraportos pri sia sukceso (aŭ malsukceso) al sia aŭskultantaro.

tempon por luksaĵoj kiel studi lingvojn!

Poste mi parolis kun junulino, kiu devis preni por li la pliajn informojn, kiujn li povus bezoni. Mi devis skribi utilajn frazojn en Esperanto kaj instrui al ŝi ilian ĝustan prononcon (ŝi estis fakte itala, do ne havis problemojn pri bona prononco!), por ke ŝi poste transdonu tiujn informojn al Paul Ross. Mi ankaŭ rapide montris al ŝi mian kutiman ĝeneralan prezenton pri Esperanto, kiun ŝi kopiis sur sian komputilon. Ŝi mem fariĝis tre interesata kaj entuziasma.


Mi ankaŭ menciis *Duolingo*n kaj *Lernu*, la du plej popularajn kaj facile troveblajn rimedojn, per kiuj homoj nun lernas Esperanton. ■



Paul Ross.

SALUTON! Mi estas Ariel, la prezidanto de JEB, la junulara sekcio de EAB, kaj mi ĝojas povi informi, ke ni okazigis renkontiĝon en Bath, kiun mi nun priraportas, esperante, ke vi konatiĝu kun la etoso de niaj aranĝoj kaj eble partoprenos iun venontan! (Kaj eble iometete por ĵaluzigi vin, ke vi ne venis...)

La renkontiĝo estis tre sukcesa, laŭ mia humila opinio. Ni havis pli ol dudek partoprenantojn el diversaj landoj, inkluzive de Svedio, Slovakio, Nederlando, Germanio, kaj Francio (kaj eĉ Britio!), kaj la programo estis bunta. Bath estas mia hejmurbo, kaj pro tio mi havis ŝancon dividi la belegan arkitekturon de mia urbo kun la partoprenantoj.



Post ioma malapero dum la lastaj jaroj, Junularo Esperantista Brita neatendite reaperis fine de 2016 per starigo de sukcesa kongreseto en Bath, kiun partoprenis eĉ amikoj loĝantaj eksterlande.

La prezidanto de JEB, **Ariel Bonkorpa**, resumas la aranĝon, okazinta de la 11-a de novembro 2016 ĝis la 13-a.

La renkontiĝo ekis vendrede ĉe la drinkejo *Wetherspoons*. Tio jam fariĝis antaŭ multaj jaroj tradicio, ke ni almenaŭ unufoje iras al *Wetherspoons* dum JEB-renkontiĝo. Kun malmultkostaj drinkaĵoj kaj manĝaĵoj, ĝi estas bona loko por babili kaj klaĉi.

Sabate ni komencis la matenon per urbogvidado. Malgraŭ la

pluvema kaj griza vetero, ni plaĉe promenis tra la urbo, kaj mi nur iomete tedis homojn per mia esperantlingva ĉiĉeronado!

Bonvenis ne nur junuloj: Neil Roberts, "la Kapitano", Paulína Kožuchová kaj Marteno Miniĥ en loka taverno.

Vi eble divenos de la nomo, ke Bath origine havis famon pro tio, ke ĝi estas banurbo. La Romiaj setlantoj malkovris varmajn akvofontojn sub la tero kaj konstruis tre pompan banejon en la urbo. Dum la epoko de Jane Austen, kiu ankaŭ loĝis en la urbo, ĝi estis populara turismejo. Homoj venis por kuraciĝi en la banejoj, kaj poste ĉeestis burĝajn balojn en la danchaloj de la urbo. Arkitekture preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj en Bath estas el la sama "Bath-ŝtono", kiu donas uniforman kaj ĉarman aspekton al la tradiciaj kvartaloj de la urbo.

Post la ĉiĉeronado ni iris al la Komunuma Centro *Percy* por tio, kion mi nomas "kongreseto". Mi elektis la nomon, ĉar okazis simila programo dum mia unua renkontiĝo, sed iu informis al mi poste, ke "kongreseto" pensigas pri la infana kongreseto, kiu okazas ĉiujare dum UK. Nu, ni ĉiuj estas infanoj en la koro, ĉu ne?

Dum la kongreseto pluraj homoj prelegis; Chuck Smith donis informojn pri la ekscita projekto *Amikumu*, Sasha Murr sciigis pri la TEJO-projekto pri Efika Komunikado, kaj Tim Owen klarigis al ni la historion de la emblemo de EAB.

Poste ni ludis Homlupojn, rolludon, en kiu la partoprenantoj prenas diversajn rolojn en vilaĝo



Dum pluraj daŭre dormis post longa sabata vespero kaj malfrua enlitiĝo, Zina Barinova, Kat Newbould kaj Clare Hunter vizitis la vidindaĵojn.

plagita de homlupoj. Mi estis homlupo, kaj mi povas fiere konstati, ke ni tre bone atingis nian finan venkon, manĝinte ĉiujn vilaĝanojn en la ludo.

La ĉefa tago de la renkontiĝo finiĝis per komuna manĝo ĉe barata restoracio, kaj poste pli da drinkejumado. Bedaŭrinde mankas fotoj pri tiuj ĉi, sed eble tio estas pli bona. Kio okazas en Esperantujo, restu en Esperantujo...

Dimanĉo estis la adiaŭa tago. Matene estis malgranda ekskurso al la Romiaj Banejoj, la ĉefa turisma punkto de la urbo. Ŝajne la plejparto da homoj tro amuziĝis la antaŭan vesperon, ĉar ni estis malmultaj tie. Pli da homoj venis al picejo por tagmanĝo, kie ni povis brakumi unu la alian antaŭ la forvojaĝo. Iuj restis, kaj ni pasigis la ceteron de la tagon tre malstreĉe kaj ĝue.

Se vi interesiĝas veni al la venonta JEB-renkontiĝo, nepre



Ariel Bonkorpa kaj Paulína Kožuchová, kunlaborantoj de la blogo *Egalecen*.



Aŭdiĝis pluraj prezentoj. Ĉi tie prezentas Tim Owen la rakonton malantaŭ la emblemo de EAB.

ŝatklaku nian *Facebook*-paĝon (troveblan je la nomo “Junularo Esperantista Brita”). Niaj eventoj celas junajn esperantistojn, sed estas malfermaj al ĉiuj, sendepende de aĝo aŭ lingvonivelo. Niaj aranĝoj preskaŭ ĉiam havas grandan mikson de generacioj, do sentu vin bonvena! ■

Ariel Bonkorpa estas la prezidanto de JEB. Krome ŝi aktivas en *Egalecen*, la unua blogo pri feminismo kaj socia justeco en Esperanto, kaj verkas fikciaĵojn kaj ludojn en la verda lingvo. Foje ŝi eĉ videoblogas. Por trovi la menciitajn aferojn, iru al verdkorpa.wordpress.com.

Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?

Damon Lord,
Kat Newbould

TO Kelkaj el niaj veteranoj eble memoros vin de via junaĝo, Damon. Aliaj supozeble demandus sin, ĉu vi havas parencon, kiun ili iam konis ...

DL Nu, mi kunhavas la familinomon kaj inicialon kun Don Lord, cetere tre afabla homo, kiun mi renkontis unu-dufoje, sed ni neniel estas parencoj.

TO • Ho, jen novaĝo! Vi fakte *renkontis* Don Lord. Do, vi ne estas novulo?

DL • Nu, mi unue eklernis Esperanton en 1996, kiam mi estis 17-jara. Mi eĉ helpis organizi la kongreson en mia hejmurbo Newport en 1999. Do nova mi ne estas. Nove realveninta, tamen, jes.

TO • Sed vi, Kat, ja estas novulino.

KN Prave. Mia sola ligilo kun Esperanto estas, ke okazis en mia hejmurbo Universala Kongreso. Sed tiu de Harrogate en 1961 aperis pli ol 30 jarojn antaŭ mia propra enmondiĝo!

TO • Do, kiel Esperanto trovis vin?

KN • Mi uzis *Duolingo* por refreŝigi mian scipovon de la sveda, kaj rimarkis, ke aldoniĝis Esperanto. Do mi eklernis per *Duolingo*, aliĝis al la subtengrupo por duolinganoj ĉe *Facebook*, kaj tie renkontis vin, ĉar vi estas unu el la spertaj volontuloj, kiuj helpas la novulojn. Aŭ pli ĝuste, tie renkontis viajn reklamojn por la senpaga kurso de EAB, *Lernu* ...

TO • ... kaj legis miajn proponojn por financaj subvencioj per la Norviĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo ...

KN • ... kaj do mi partoprenis mian unuan sesion de *Lernu*.

TO • Vian unuan, sed ne lastan!

KN • Ha, jes! En tiu unua jaro mi partoprenis tiun sesion, du pliajn de *Lernu Plu*, drondon en

En la ĉi-numera *Kiu kiuas?* ni renkontas ne unu homon, sed du. **Damon Lord** kaj **Kat Newbould** proponis sin lastatempe por fariĝi kuratoroj de EAB. **Tim Owen** parolis kun ili por iom pli ekscii pri ambaŭ ...



Londono, kaj eĉ vizitis Kastelon Greziljono en Francio!

Kat, maldekstre, jam amikiĝis kun alilanduloj, ĉi-foje Natalja Gerlach el la muzikparo *Ĵomart kaj Nataŝa*.

DL • Kiel Kat por la sveda, mi ankaŭ uzis *Duolingo* por refreŝigi mian scipovon de Esperanto. *Duolingo* tamen ni ne havis, eĉ ne interreton, kiam mi eklernis. Mi studadis la francan lerneje, sed trovis ĝin malfacila. Mia instruisto, kiu sciis, ke mi interesiĝas pri lingvoj, indikis al mi la libron *Teach Yourself Esperanto* kaj la vortaron de John Wells. En la biblioteko mi trovis ekzempleron. Dum tiu semajnfino mi trarapidis la unuajn dek ĉapitrojn, do decidis tuj kontakti Derek Fielding, la organizanton de la loka klubo, la Verda Drako, kies kontaktdetaloj troviĝis en la libro. Li kaj la aliaj

grupanoj estis tiel ĉarmaj, ke mi rapide ekaktivis. Sed post tri-kvar jaroj studado kaj aliaj aferoj fortiris min de Esperanto. Reveninte mi antaŭĝuas sperti internacian Esperanton denove, aparte ĉe la Universala Kongreso en Lisbono.

KN • Same mi pensas partopreni!

TO • Do vi devas inter vi batali por esti tiu, kiu salutos la kongresanojn nome de Britio dum la solena malfermo! Kaj eble tiam estos tuta armeo da duolinganoj por konkurenci!

DL • Ĝi estas mirinda fonto de

novaj lernantoj. Jam pli ol 800 000 komencis, kvankam eĉ ne dujara estas la kurso. Ĉiun tagon finas ĝin centoj da homoj – tio signifas, ke pli ol 30 000 homoj en tiu jaro interesiĝis sufiĉe pri Esperanto por investi dekojn da horoj da sia tempo por lerni la lingvon.

KN • Mi opinias, ke *Duolingo* certe popularigis Esperanton. Pluraj homoj en la lingvolernadaj rondoj, kiujn mi partoprenas, komencis lerni Esperanton, simple ĉar ili vidis ĝin tie. Ja tielis por mi. Ne plu oni bezonas paperon kaj skribilon; oni povas lerni dum la vojaĝo al la laborejo; la lernado estas senpaga kaj rezultoj tujaj; ĝin oni kreis ludstilo do amuze; kaj la gramatikaj notoj kaj helpetiloj, kiujn verkis la skipo, estas elstaraj.

TO • EAB certe provas oferti ion modernan kaj utilan al tiuj novuloj. Ĝuste tiel ni kaptis vin, Kat, kaj rekaptis vin, Damon.

DL • Unu el la kialoj, kiuj instigis min rememriĝi post duono de mia vivo fore estas, ke mi ne plu havas la senton, ke EAB baziĝas en la pasinteco. Mi ne celas ofendi, sed ĉirkaŭ 1999 mi memoras aŭdi plendojn pri ekuzo de retroŝto, ĉar “Esperantistoj uzu nur paperon kaj skribilon”. Mia loka grupo havis tre bazan retejon, kiun mi

mem starigis (kaj kiun kredeble tiam vizitis nur ni, tion mi plene agnoskas). Sed estis evidente tiam, kiudirekten iros la estonteco, kaj tamen aŭdiĝis la komentoj, ke pri la interreto ni ne okupiĝu, ĉar “esperantistoj lernas per libroj”. Lastatempe mi ĝojis konstati, ke pri EAB respondecas homoj, kiuj pensas pri la estonteco, kiuj kapablas pensi ne “tiel estis tiam, do tiel ni daŭre faros”, sed “tiaj estas la hodiaŭaj normoj, do tiel ni faros”. Al mi plaĉegis vidi, kiel EAB subtenis tre frue la apon *Amikumu*, kiu miatakse estos elstare utila por Esperanto kaj lernantoj. Ne nur ĉar ĝi permesos al lernantoj trovi aliajn apud ili, sed kiam ĝi etendiĝos al pliaj lingvoj, tiam lernantoj de, ekzemple, la germana vidos Esperanton kiel elekton. Imagu la sindemandon: “Ĉu homoj parolas tion?” Kaj per unusekunda kontrolo ili ekscios, ke jes, kaj eble, ke troviĝas lernanto en la sama kvartalo. Kiel diris Kat pri *Duolingo*, tia malŝirmo igas homojn lerni, kiuj alie eĉ ne pensus provi.

KN • Kiel preskaŭ ĉiuj hodiaŭ, mi estas membro de nenio ... krom de EAB. Kio pensigis min aliĝi al EAB estas, ke mi partoprenis *Lernu*, treege ĝuis la sperton, kaj volis, ke aliaj homoj ankaŭ ĝuu ĝin. Kaj tiel mi elektis membriĝi por montri subtenon.

TO • Kaj ne nur membriĝi por montri subtenon kaj aprobon, sed ankaŭ proponi vin por esti kuratoroj de EAB. Kian estontecon vi perceptas?

KN • Pensoj pri la estonteco de Esperanto? Nu, mi ja ŝatus, ke ĝi fariĝu ĉies dua lingvo ... sed mi ne kredas, ke tio iam ajn okazos. Min kontentigus, ke ĝi kresku sufiĉe, ke homoj ne plu demandas min, kial mi lernas ĝin! Mi opinias, ke multaj homoj, aparte en Britio, kredas sin nekapablaj lerni lingvojn, do mi ŝatus, ke Esperanto pli disvastiĝu, por ke tiaj homoj pensu gustumi ĝin.

Damon kun sia edzino Angie en la ĝardenoj de Princes Street, Edinburgo.

DL • Junaĝe mi estis, ni diru, naiva. Mi vere kredis, ke mi vidos la finan venkon de Esperanto. Nun mi estas multe pli realisma. Esperanto ne estas la internacia lingvo, sed ĝi tamen estas fakta internacia lingvo, perfekte funkcia kaj vivanta. Ekzemple, antaŭ unu tagoj mi babilis skajpe kun ĉino. Tiu amiko ne parolas la anglan. Certe estos estonteco por Esperanto, precipe kiel ponto inter kulturoj. Mi pretas labori por doni al ĝi tian estontecon.

TO • Kiel? Ĉu vi anticipas apartajn projektojn?

KN • Profesie mi programas. Mi ŝatus krei subtenan kurson post-duolingan, kiu funkcius iom kiel



ESPERANTO estas bonega rimedo ne nur por komuniki aŭ amikiĝi, sed por peti, doni kaj ricevi helpon, precipe kiam alilingvanoj povus doni nur iom por helpi tamen multe. Tiel mi ricevis retroŝton de Etienne Katchelewa, esperantisto, kiu loĝas en Demokratia Respubliko Kongo.

Tio ne estas la unua tia kontakto, kiun mi ricevis de samideano afrika. Antaŭ kelkaj jaroj, membroj de la Skiptona grupo kaj de la federacio de Yorkshire kaj Humberside kolektis

monon por helpi al projekto *Mazingira* en Tanzanio. Tiam nia ĉefa celo estis aĉeti la ekipaĵon por radiostacio, tiel ke la lokaj organizantoj povu starigi komunuman radioservon, kiu informu pri diversaj sociaj aferoj, inkluzive sanon kaj akvo-konservadon, kaj ankaŭ pri Esperanto. La "motoro" de *Mazingira* estas Mramba Simba, esperantisto, kiun mi persone ekkonis antaŭ preskaŭ tridek jaroj ĉe ILEI-konferenco en Nederlando.

Easy Reader, sed kun vortprovizo unika por ĉiu uzanto, depende de ties fortoj kaj malfortoj.

DL • Mi rimarkis, ke mankas en Esperantujo novaĵoj vermondaj verkitaj por komencintoj. Do mi antaŭ ne longe starigis retejon, kie aperas ĉiun tagon mallonga novaĵartikolo verkita en simpla Esperanto, kun klarigaj rimarkoj kie ŝajnas al mi, ke vorto estus por novuloj nekonata. Tiu provo ricevas ĉirkaŭ 200 vidojn ĉiutage, do mi esperas pligrandigi ĝin ene de EAB.

KN • Mi dezirus alirebligi la bibliotekon. Ĝi situas longe for

de la plejparto de homoj, do mi dezirus bitigi kelkajn el la pli malnovaj libroj, tiel ke aliaj homoj povos profiti de la historio kaj kulturo de Esperanto, kiuj troviĝas fizike sur biblioteka bretaro.

DL • Similan penson pri bitigado ankaŭ mi havas, sed antaŭen plian paŝon: mi pensis eĉ reeldoni kelkajn el la skanitaj libroj kaj tiel doni al ili duan vivon.

TO • Interese aŭdi tion! Ĝuste inter la nuna kuratoraro jam okazas laboro tia. Mi certas, ke vi du estos valoraj kontribuantoj kaj antaŭĝuas la kunlaboradon! ■



Tiam li estis “simpla” tajloro; nun li estas urbestro de kolekto da vilaĝoj. Li profitigis sian komunumon per la esperantistaj kontaktoj, kiujn li flegis aparte en Eŭropo, kaj dum la jaroj per ilia financa kaj praktika helpo li fosigis akvoputojn, konstruigis orfejojn kaj lernejon kaj akiris gravajn medicinajn helpojn por infanoj kun interalie misformitaj piedoj aŭ kruroj. Ĝuste dum la pasinta decembro kelkaj britaj esperantistoj denove finance subtenis la ĉeeston de pluraj junaj tanzanianoj ĉe la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto, pri kiu oni povas legi pli detale en la januara kaj februara numeroj de *Esperanto*.

Samideano Etienne Katchelewa jam dum pluraj jaroj gvidas projektojn en la urbo Kalima, per

kiuj oni venigas akvon de riveroj al sekaj regionoj. Kaj li kontaktis min ĝuste por peti financon helpon de Britio. Do, mi esperas, ke kelkajn inter vi mi instigos fari mon-donacon al tiu projekto. Oni povas transpagi monon al la UEA-konto [ekkn-y](#). Por aliaj pag-ebloj, bonvolu kontakti min ĉe mjesperanto@btinternet.com.

Ĉi tiun projekton kaj aliajn subtenindajn vi trovos rete ĉe la retejo de la Asocio de Verduloj Esperantistaj, ĉe verduloj.org/afriko.htm. Kaj vi povos informiĝi rekte pri AVE kaj pri tiaj labor-projektoj, ĉar de la 2-a ĝis la 5-a de majo, AVE kunsidos en Freiburg/Breisgau okaze de la kongresoj de EEU kaj de la Germana Esperanto-Asocio. Do, ne nur la britoj havos “kunkongreson” en majo! ■

KELKAJ homoj en la Esperanto-movado celas starigon de sendependa ŝtato, kie regus la etoso de la internacia lingvo. Supozeble tiu ŝtato havus urbon, aŭ eĉ ĉefurbon, kiu bezonus efikan sistemon de loka publika transporto, ekzemple kun busoj aŭ tramoj. Kiel tia sistemo aspektus?

Do, ĝi bezonus reton de klare distingeblaj linioj, laŭ kiuj veturiloj regule kaj ofte veturus. Tarifoj devus esti malaltaj por la publiko, kaj iom kongrui kun la distanco de la vojaĝo. Unu linio devus rondiri la tutan urbon. Veturiloj

ekirus sen konsideri la kvanton de vojaĝantoj. Kaj veturiloj kaj kondukistoj devus esti facile rekoneblaj, per farbaj motivoj kaj uniformoj. Kaj ĉar eĉ Esperanto-ŝtato troviĝus en neperfekta mondo, necesus sistemo por pritrakti plendojn de uzantoj pri la servo.

Nu, ĉiujn tiujn ecojn havis sistemo ellaborita de franca filozofo Blaise Pascal en Parizo en 1662, kaj ĝi funkciis dum ĉirkaŭ 18 jaroj. Paskalo kreis la unuan lokan publikan transportsistemon en la mondo.

Kial ĝi okazis tiam, kaj tie?

Antaŭe, la urboj de mezepoka Eŭropo estis kompaktaĵoj. Homoj loĝis ne longe for de sia laboro; apudis lokoj, el kie ĉerpi akvon kaj aĉeti manĝaĵon. Nur riĉuloj vojaĝis pro aliaj kialoj, kaj ili aŭ posedis kaleŝojn, aŭ luadis tiel nomatajn “fiakrojn”, similajn al modernaj taksioj, sed ĉevaljungitaj. Tiuj aperis, kaj en Parizo kaj en Londono, frue en la 17-a jarcento. Tamen Parizo, kun 530 mil enloĝantoj, estis jam tiam la kvina plej granda urbo en la tiam konata

mondo – do pli-malpli komparebla kun la

Artikolo bazita sur prelego ĉe la Somera Festivalo en Shallowford, 2015.

nuntempa Ŝefildo – kaj supozeble ĝi jam ekspertis la transportbezonojn de moderna urbo.

Estis Paskalo, kiu respondecis pri la koncepto de tiu nova sistemo. Kia homo li estis? Li naskiĝis en Clermont-Ferrand, Auvergne, en 1623. La patro respondis pri la edukado de la infanoj kaj instruis ilin hejme laŭ metodoj tiam nekutime progresemaj. La juna Paskalo eklernis la latinan nur 12-jaraĝa, kaj matematikon nur poste, laŭ sistemo kiu emfazis antaŭ ĉio aŭskultadon. Kiel klerulo Paskalo okupiĝis pri filozofio, fiziko, matematiko kaj, pli malfrue

en la vivo, teologio. Li estis ankaŭ tre praktika homtipo: li inventis barometron kaj kalkulilon. Sed li estis ankaŭ homaramika kaj volis helpi malriĉulojn. Jen kroma motivo por ke li starigu malaltkoston transportsistemon. Liajn profitojn el la entrepreno li intencis elspezi por helpi al malriĉuloj en la urbo Blezo en la regiono de Tours, kaj al orfejo en Parizo. Al la familio de Paskalo mankis mono – la patro bezonis repagi ŝuldojn, kaj pro tio la filo inventis sian kalkulilon – kaj verŝajne liaj propraj spertoj dum la vivo influis lin tiurilate.

Kvinpencaj kaleŝoj

Necesis starigi tiun publikan servon. Tiam ne estis libera merkato en Parizo. Francio estis absoluta, centralizita regno. Do oni devis peti permeson de la juna tiel nomata “Sol-reĝo”, Ludoviko la 14-a. Tion faris en aŭtuno 1661 grupo da sinjoroj, precipe aristokratoj. Ili intencis fondi entreprenon por veturigi publike atingeblajn kaleŝojn inter la diversaj kvartaloj de Parizo. Kaleŝoj devis eliri regule laŭ horaro kaj ĉiam laŭ la samaj kursoj. La tarifo ĉe la proponita nova sistemo estis kvin *sols* por ĉiu pasaĝero (*sol* estis malaltvalora monero, poste konata kiel *sou*) sen konsideri la distancon de la vojaĝo. Pro tio ili ricevis la nomon “kvinpencaj

kaleŝoj”. La permeso de la reĝo en januaro 1662 donis al tiu entrepreno monopolon.

Post kelkaj eksperimentoj ekfunkciis la servo en marto tiujare. La veturiloj estis survojoj de la 7-a matene ĝis la 8-a vespere, aŭ ĝisnokte dum la somero. Ekde junio la rondirkurson, la tiel nomata *Rondvojaĝo de Parizo*, oni dividis en ses etapojn. Traveturante du etaplimojn aŭ “buroojn”, oni devis pagi kvin pluajn *sols*.

En marto okazis solena inaŭguro, kun kavalerio kaj du registaraj oficialuloj. Unu avertis la publikon nek damaĝi la veturilojn nek provi konkuri kun ili per starigo de alia simila servo; necesis respekti la monopolon. Ĉiu veturilo portis la blazonon de la urbo Parizo kaj enhavis ok sidlokojn, kun kaleŝisto kaj lakeo. Ili ambaŭ portis blujn uniformojn, kun galonoj en diversaj koloroj laŭ la linio: ruĝa, oranĝa, blua kaj verda.

Unue la kaleŝoj furoris aparte ĉe riĉuloj, kiuj luktis kun la malriĉuloj por trovi sidlokojn. Eĉ la Sun-reĝo provis la servon. Evidente la kvinpencaj kaleŝoj estis sufiĉe bone konataj tra la urbo, ĉar samjare prezentiĝis en la Teatro du Marais komedio kun la titolo *La Komploto pri la Kvinpencaj Kaleŝoj*.

La servo haveblis por ĉiuj, kaj veturis regule laŭ horaro – je ĉiuj 7,5 minutoj. Tarifoj ĝustigiĝis laŭ la

distanco de la vojaĝo. Dungitoj portis uniformon. Estis eĉ sistemo por pritrakti plendojn flanke de la pasaĝeroj. Evidente la kvinpencaj kaleŝoj plenumis ĉiujn postulojn de moderna uzanto de tia servo. Do kial ili ne travivis por famiĝi? Ĉu Paskalo iel fuŝis?

Mi kredas, ke ne; sed la tiama pariza socio ne estis tiu de la moderna transportuzanto. Ĝi estis ankoraŭ feŭda, kaj la homoj pensis feŭde. El la parlamento venis baldaŭ dekreto, kiu limigis aliron al la kvinpencaj kaleŝoj. Soldatoj, lakeoj, paĝioj, servistoj kaj certaj aliaj homgrupoj ne plu rajtis eniri la kaleŝojn, ĉar riĉuloj kaj burĝoj ne volis vojaĝi kun tiaj malaltrangujoj. La dekreto, kaj altiĝo de la tarifo de 5 ĝis 6 *sols*, provokis fortajn protestojn, foje kun perfortaĵoj. Tiel la kvinpencajn kaleŝojn oni iom post iom malŝatis. La polico minacis protestantojn per vipado kaj aliaj severaj punoj. La servo fine fermiĝis iam inter 1677 kaj 1680 (aŭ laŭ certaj fontoj daŭris ĝis 1691). Do, se ĝi funkciis minimume dek kvin jarojn kaj maksimume dudek naŭ jarojn, ĝi certe havis iom da sukceso.

Bedaŭrinde la daŭre malsaneta Paskalo apenaŭ spertis tion. Li mortis nelonge post la malfermo de la lasta linio. Laŭdire, lia vojaĝo en kaleŝo dum la malfermo de la unua

Blaise Pascal.



linio estis lia lasta ekskurso en la urbon.

Omnes Omnibus

Kio okazis al publika transporto post la malapero de tiu pariza eksperimento? Post pli ol cent jaroj, en la okcidenta urbo Nantes en 1826, Stanislaus Baudry starigis publikan ĉarservon, ankoraŭ ĉevaljungita. La sekvan jaron li dungis londonanon, George Shillibeer, kiu fasonis laŭmendan veturilon kun sidlokoj por pli da homoj - antaŭiranto de la moderna aŭtobuso. Kontraŭ ĝia haltejo estis ĉapelbutiko, kiu portis la latinan tekston *Omnes Omnibus* (= ĉiaj [ĉapeloj] por ĉiuj [klientoj]). La nova veturilo tial ricevis la kromnomon *omnibus*, ĉar ĝi ja estis publika servo. Shillibeer baldaŭ reiris al Londono, kaj starigis similajn servojn tie.

Ekster Londono, en Manĉestro iu John Greenwood jam en 1824 starigis ĉarservon inter Pendleton kaj Manĉestro. Tiu populariĝis, ĉar ne necesis antaŭmendi sidlokojn. Tiam Greenwood pligrandigis sian entreprenon kun kursoj de Manĉestro al Ĉestro, Buxton kaj Ŝefildo – granda atingo, se oni pripensas la krutajn deklivojn en la regiono kaj la staton de ĝiaj tiamaj vojoj.

Baudry en Nantes, Shillibeer en Londono, Greenwood en Manĉestro: entreprenemaj homoj, kies karieroj floris en tiu industriiĝa epoko – sen reĝa permeso, sen subteno de aristokrato, sen konsilo de filozofo. Ĉu ili konis la kvinpencajn kaleŝojn kaj ĉerpis inspiron el la modelo de Paskalo? Verŝajne ne. Artikoloj pri Paskalo kaj liaj kaleŝoj ja aperis en diversaj revuoj anglaj kaj francaj por kleruloj – en 1724, 1835, en la 1890-aj jaroj kaj poste; sed mi dubas, ĉu Shillibeer aŭ Greenwood legis ilin. Tiaj sinedukintaj homoj verŝajne nenion sciis pri la filozofo kaj lia prabusservo.

Tago de publika transporto

Kion Paskalo heredigis al ni per sia publika transportsistemo? Samkiel la flugmaŝino de Leonardo da Vinĉi, ĝi aperis tro frue en la historio por realiĝi. Por plena sukceso ĝi bezonis: toleremon inter civitanoj; malpli da konscio pri

sociaj klasoj; kaj la pretiĝon adapti al la postuloj de vivo en granda urbo. Por ĉio ĉi la tiama Parizo ankoraŭ ne estis preta. Tamen la kvinpencaj kaleŝoj meritas pli da agnosko, ol ili ĝis nun ricevis en angleparolantaj landoj. Tie oni malvolonte salutas la atingojn de famuloj, kiuj ne parolis angle – laŭ la supozo, ke sen la angla lingvo ili ne vere povas esti famuloj. Mi rimarkis, ke poŝtmarkoj el certaj landoj foje agnoskas famulojn el aliaj landoj. Laŭ mia scio tio ne okazas en Britio. Signifoplena estas por mi, ke la vikipedia artikolo pri la kvinpencaj kaleŝoj aperas nur en la franca, la germana kaj la korea! – do nek angle nek esperante.

Krome agnoskendas, ke publika transporto ne estas la plej sorĉalloga temo por famuloj. Tiujn oni ofte vidas en aŭ apud aŭtoj, motorcikloj aŭ aviadiloj; ege malofte apud busoj aŭ tramoj.

Mi notis lastatempe, ke interrete abundas informoj pri memortagoj por diversaj aferoj. La 30-a de septembro, ekzemple, estas la Internacia Tago de Tradukistoj. Laŭ mi ni bezonas tian tagon por publika transporto – eble kun la nomo “Paskal-tago”. Se vi same opinias, kial ne proponi tion al viaj kunparolantoj? Kaj la venontan fojon, kiam vi uzos buson, tramon aŭ ion similan, mi petas vin pensi pri Paskalo. ■

MI FARIĜIS esperantisto en 1969, kaj ĝis 2015, post 46 jaroj da esperantisteco, mi ankoraŭ ne vizitis la Centran Oficejon de UEA. Mi kredas, ke oni nepre provu viziti tiun sidejon almenaŭ unufoje en sia esperantisteco. Mi ne faris, ĉefe pro timo trovi la oficejon en la grandega urbego Roterdamo. Mi ne devintus timi!

En oktobro 2015 mi subite havis la oportunun pasigi unu tagon en Roterdamo. Mia amiko Terry aĉetis paron da timbaloj en Nederlando pere de interreta aŭkcio. Li volis mian helpon ĉar, inter ni, nur mia aŭto povis teni timbalparon! Do, unu tagon en oktobro 2015, ni lasis la aŭton ĉe la pramŝiphaveno en Hull kaj ĝuis dumnoktan vojaĝon en la *Fiero de Roterdamo* kun multege da pasaĝeroj. Kial tiom da homoj ĉiutage vojaĝas inter Roterdamo kaj Hull? Jen demando!

Longa je 215 metroj, la *Fiero de Roterdamo* estas fakte unu el la plej grandaj pramŝipoj en Eŭropo. En 12 ferdekoj troviĝas ne nur drinkejoj, restoracioj kaj vendejoj, sed ankaŭ kazino, kinejo, koncertejo kaj 546 dormejoj. Estas loko por 1360 pasaĝeroj, 250 aŭtoj, 400 ŝarĝaŭtoj kaj 1 timbalparo – kiel mi aldone skribis al Terry!



Se vi jam ekinteresiĝis, sciu ke biletoj estas malpli kostaj mez-semajne, kaj nepre antaŭmendu aŭtobusbileton por atingi la centron de Roterdamo post forlaso de la pramŝipo! Tiu aŭtobuso iras ĝis la mezo de Roterdamo tuj apud la ĉefa stacidomo.

De tie estas tute facila 15-minuta promeno al la Centra Oficejo de UEA ĉe Nieuwe Binnenweg 176 (fotita). La mapo, kiu troviĝas en ĉiu *Jarlibro*, estas certe utila, sed se vi volas pli bonan mapon, tiaj vendiĝas ĉe la stacidoma informĝiĉeto kontraŭ nur unu eŭro.

Ni atingis la Centran Oficejon ĝustatempe por ĝui kafon kun ĉiuj laborantoj en la ripozejo. Amuzis min vidi, je mia eniro, ke ĉiuj legis ekzempleron de *Esperanto*, kvazaŭ antaŭaranĝita por mia vizito! Sed ne. Simple tiu ekzemplero estis ĵus liverita de la presejo.



Do la tiutempa ĉefulo Osmo Buller salutis kaj bonvenigis nin. Mi ankaŭ povis paroli kun Veronika Poór, la nova direktoro, kiu faris rapidan viziton al la oficejo. Estis ĉirkaŭ dek laborantoj ĉe la tablo, el diversaj landoj, kaj Terry miris pri la parolflueco.

Poste, unu el la oficistoj, Clay, bonkore montris al ni preskaŭ ĉiujn ĉambrojn en la konstruaĵo – kiel vi povas imagi, estis libroj, pakaĵoj kaj paperoj ĉie! Vera oficejo, kie oni multon faras.

Mi ĝoje fotiĝis kun Zamenhof, aŭ almenaŭ lia busto!

Je la fino mi pasigis tro da tempo en la impona librovendejo kaj aĉetis kelkajn aferojn. Atentu – la aĉetado mem estas longdaŭra afero. La vendisto devas pretigi tre komplikan kvitancon.

Forlasinte la oficejon, kaj je nia miro, ĉiuj aliaj allogaĵoj por ni troviĝis en la sama strato, Nieuwe Binnenweg, kiel la oficejo! Ĉe numero 81, estis vendejo de tre malmultekostaj brokantaj kompaktdiskoj (*Plaatboef Rotterdam*) kaj ĉe numero 53 troviĝis perfekta drinkejo de belgaj bieroj, *Belgisch Biercafé Boudewijn*, kie ni povis elekti el menuo de 160 bieroj! Finfine, trans la strato ĉe numero 24, ni eniris *Co-op*-vendejon kaj plenigis niajn sakojn je bongustaj nederlandaj brunaj bieroj por kunporti hejmen.


Ĉe la haveno, ni facile trovis la vendiston de la timbaloj. Ni puŝis ilin en la pramŝipon, kvazaŭ oni ĉiutage vojaĝas kun timbaloj! En Hull, la policistoj volis dispecigi ilin, sed feliĉe ili ne havis la ĝustajn ilojn. Poste, ili proponis fari X-radiaĵojn, sed la maŝino ne estis sufiĉe granda! Do ni rajtis hejmeniri kaj la timbalojn mi facile liveris al la domo de Terry.

Entute, tre bona tago kaj mi forte rekomendas tian viziton, eĉ sen timbalparo! ■

Sen unu aparta homo ne ekzistus Esperanto. Nek la lingvo, nek la movado. Tial en ĉi tiu eldono de *La Brita Esperantisto*, ni prezentas ĉi-rubrike, okaze de la centjariĝo de lia morto, la iniciatinton de Esperanto, **Ludovikon Zamenhof**, kaj liajn ligojn kun la brita movado.

EN LIGNA DOMO en la urbo Bjalistoko, gubernio de Grodno, la 15-an de decembro 1859 naskiĝis filo al Mordeĥaj kaj Rozalia, ilia unua infano. Dum du jardekoj sekvis 8 pliaj. Tiun unuan bebon la junaj gepatroj nomis Lejzer; la historio konas lin kiel Ludoviko Lazaro Zamenhof.


Dum sia junaĝo li komencis revii pri mondo, kiun li poste priskribis poemforme en 1890 – mondo, en kiu, “sur neŭtrala lingva fundamento”, la “popoloj dividitaj” de la Tero formas “unu grandan rondon familian”. Translokiĝinte al Varsovio kaj komencinte studi ĉe la gimnazio, la diligenta junulo profunde pensadis pri tiu fruĵara revo. Tralegado de gramatikoj franca kaj germana ne helpis lin, sed unu tagon en la kvina lerneja klaso li renkontis la anglan lingvon, kaj trafis lin la penso, ke lingvoj ne nepre devas suferi sub la peza



Jam en 1875 Zamenhof estis komencinta prilabori sian lingvon.

ŝarĝo de komplikaj gramatikaj formoj.

La unua versio de lia lingvo pretiĝis, dum li estis ankoraŭ lerneĵano. Zamenhof kaj kelkaj liaj kamaradoj kantis en tiu *lingwe uniwersala* la 17-an de decembro 1878. En 1879 li eniris la medicinan fakultaton de la moskva universitato kaj tie pasigis du jarojn, en kiuj li ja prilaboris lingvan projekton, sed ne la ĝistiaman; li aŭdis pri la publikigo de aliula planlingvo, Volapük, kaj rezignis pri sia propra, turninte sin al projekto ellabori gramatikon de la jida, la lingvo komuna inter judoj, kie li edukiĝis.



Zamenhof dekokjara. Fine de tiu jaro kantiĝis himno en lia *lingwe uniwersala*, la unua versio de Esperanto.

Reveninte al Varsovio en 1881 li registriĝis ĉe la medicina fakultato de la tiea universitato kaj denove prilaboris sian lingvon, version kiu fakte pli malproksimas al la nuna Esperanto ol tiu unua. Li tamen rapide moviĝis al nova intereso, kiam eksteraj okazaĵoj pensigis lin pri malamikeco inter la homaro.

Kristnaske en Varsovio erupciis pogromo. Judoj fuĝis vastskale al Usono. Tiam kaj tiel Zamenhof ekhavis la ideon amasigi la judojn en senhoma parto de tiu fora lando, tie konstruante judan ŝtaton. Aliaj proponis la malnovan patrujon Palestinon, kaj Zamenhof ŝanĝis sian opinion por kongrui kun tiu frua cionista movado. Li preskaŭ ne finis siajn studojn pro tiu agado; en

ruslingva letero de 1883 al anoj de la cionista movado *Hibat-Cion* li indikis, ke li tuj post la pogromoj intencis instali sin en Palestinon kaj okupiĝi pri agrikulturo. Sed intertempe li seniluziiĝis pro la manko de progreso fare de siaj cionistaj kamaradoj kaj forlasis la movadon.

Post la studaj jaroj Zamenhof fariĝis kuracisto kaj translokiĝis al Vejseje, Litovio en frua 1885. Tie li renkontis virinon, la fratino de la edzino de unu siaj cionistaj amikoj. Klara Silbernik fariĝis sinjorino Zamenhof, sed ne tuj; restis la respondeco povi vivteni familion, kaj Zamenhof rapide konstatis, ke li ne povas resti kuracisto, precipe post la morto de infano, kies vivon li ne povis savi. Li tiel decidis fariĝi okulisto kaj rekomencis la studojn, unue en Varsovio, poste en Vieno.

Unua Libro por Angloj

Lia lingvo jam pretis en 1885 sed presiston por libro pri ĝi li ne povis trovi. Unu firmao inter la petitaj promesis presi la libron, sed dum ses monatoj faris nenion, kaj pri tio Zamenhof devis finfine rezigni. En marto 1887 li, nun okulisto kaj laborante en la domo de sia patro ekde 1886, fianĉiĝis kun Klara, kies patro permesis al Zamenhof uzi parton de la doto eĉ antaŭ la geedziĝo. Tiel Zamenhof mem povis financi la presadon de la

libro, kaj la 26-an de julio 1887, ĉe la presisto Ĥaim Kelter, aperis tio, kion oni nomas ekde tiam la *Unua Libro*.

Aperis en tiu sama jaro la unuaj mencioj de tiu nova lingvo en Britio, kvankam ĝi mem ne enradikiĝis dum pluaj 15 jaroj. Studento Walter J. Crawhill legis pri ĝi kaj

korespondis latine kun Zamenhof, kiu sendis al li la germanan version de la *Unua Libro*.

Crawhill ŝajne ne interesiĝis pri la Lingvo Internacia de d-ro Esperanto pli ol tiom, sed li almenaŭ kunhavigis la artikolon kaj libron kun sia amiko, Richard Geoghegan. Estis tiu, kiu poste

sciigis al Zamenhof pri la mizera stato de la lingvaĵo en la angla versio de la *Unua Libro*, eldonita en 1888, kaj atentigis, ke per ĝi oni riskus ridindigi la projekton. Zamenhof do petis al Geoghegan, ke li verku pli ĝustan version, kaj la *Unua Libro por Angloj* aperis en 1889.

Kvankam nun jam aperis Esperanto en Britio, ankoraŭ ne aperis la esperantistoj. Nur 9 homoj el ĉi tiu insularo troviĝas en la listo

de la unuaj mil lernintoj, kiuj sendis al Zamenhof la promes-slipojn, kiuj venis kun la *Unua Libro*.

Zamenhof daŭrigis sian laboregon kune kun la pioniroj en Rusio kaj Svedio. Estiĝis la gazetoj *La Esperantisto* kaj *Lingvo Internacia*. Aperis la unua libro en la *Biblioteko*: traduko de *Hamleto*

fare de Zamenhof. Paŝon post paŝo Esperanto progresis, ĉefe pro la penado de sia iniciatinto.

Lia persona situacio estis tamen katastrofa. Li devis plurfoje translokiĝi por provi perlabori sian vivon. Eĉ la edzino kaj junaj infanoj, Adamo kaj Sofia, devis loĝi

kun la bopatro, dum Zamenhof provis gajni monon en Ĥerson, apud la Nigra Maro. En tiuj tagoj li eĉ ne havis sufiĉe da rimedoj por tagmanĝi, kvankam tiun mal-kontentigan fakton li kaŝis de sia familio.

Dum tuta jardeko li vagadis: de Ĥerson al Varsovio, de Varsovio al Grodno, de Grodno reen al Varsovio; la fina vojaĝo estis en



En 1887 - la jaro en kiu li edziĝis kaj, iurilate, patriĝis.

1897 por lasta provo sukcesigi sin kaj tiel senigi sin je la bezono ricevi financon subtenon de la bopatro.

Dekjara jubileo

La unua jubileo de Esperanto alvenis en 1897. Zamenhof jam malferme parolis pri sia mizera financa stato, nuliginte la *Bibliotekon* en 1896 pro la maltrao enspezado kaj sensukcese provinte pli frue starigi “akcian societeton esperantistan” por doni al si sufiĉe da mono por vivteni sin, dum li laboris por Esperanto. Konstatinte la gravajn financajn problemojn, kiuj minacis forpeli Zamenhofon for de Esperanto, la kunfondinto de *Lingvo Internacia*, Vladimir Gernet, starigis fonduson “Kapitalo de d-ro

Zamenhof” por la jubileo, celante per tiu mono preni de Zamenhof la respondecon devi eldoni proprakoste librojn. Jen ni vidas ligilon kun Britio; la kapitalo sukcesis eldoni nur du librojn, ambaŭ de Geoghegan: *A few words on the international language Esperanto* kaj represon de *Plena lernolibro de la universala lingvo “Esperanto” por angloj*. Zamenhof devis atendi ĝis ĉirkaŭ 1902, antaŭ ol finfine farti pli bone finance.

Ankoraŭ apenaŭ videblis Esperanto en Britio en tiu epoko. Ĝi – kaj la pli profunda rilato inter Zamenhof kaj Britio – vere ekflamis en la fino de 1902. En oktobro de tiu jaro Zamenhof ricevis peton de Felix Moscheles – baptofilo de Felix



Zamenhof kun Felix Moscheles ĉe la Internacia Kongreso en Ĝenevo, 1906. Unu jaron poste, Moscheles gastigis la Zamenhofojn kaj pentris portreton.

Mendelssohn kaj prezidanto de Internacia Asocio por Paco kaj Arbitracio – por libroj. Zamenhof devis respondi germane, ke ne plu restas libroj por angloj, kaj substreki, ke tio ne signifas, ke Esperanto viglas en Britio. Ja li skribis, ke pri aktivuloj estas “en neniun lando tiel malmulte kiel en Anglujo”. Li nomis Joseph Rhodes de Keighley, Jorkŝiro la “sola aktiva esperantisto”.

Rhodes, kune kun amiko John Ellis, starigis en la sekva monato la unuan Esperanto-klubon en Britio. La “Societo Esperanto por la ellernado kaj diseminado de la Internacia Helpanta Lingvo Esperanto inter la anglo-parolantaj popoloj” je sia unua kunveno havis 43 membrojn. Hazarde en tiu sama monato John O’Connor komencis studgrupon en sia londona hejmo. De tiu grupeto fondiĝis la Londona Esperanto-Klubo en 1903, kiu mem naskis la Britan Esperanto-Asociacion en 1904, samjare kiel Klara Zamenhof naskis la trian kaj lastan infanon, Lidjan.

Leteroj kaj fonografo

Samtempe, kiam li interŝanĝis leterojn kun Moscheles, Zamenhof ankaŭ korespondadis kun Eliza Lawrence, la sekretariino de la fama ĵurnalisto kaj kampanjisto W. T. Stead, al kiu li rekomendis kontakti Moscheles kaj Rhodes.



Zamenhof kun H. B. Mudie ĉe la Internacia Kongreso en Kembriĝo, 1907.

Estis Stead, kiu proponis la publikigon de la unua Esperanto-gazeto en Britio, kiun redaktis Harold Bolingbroke Mudie. Siajn leterojn al Lawrence Zamenhof verkis en Esperanto, “ĉar la lingvon anglan mi posedas tro malmulte”. Ĉiuokaze, Lawrence estis unu el la studentoj ĉe la hejmo de O’Connor, do por ŝi la lingvo ne longe restis nelegebla mistero. Fakte, Zamenhof eĉ proponis al ŝi, ke ŝi verku gramatikon por anglalingvanoj! Ne longe poste, O’Connor – daŭre komencanto mem – faris ĝuste tion.

Sekvis korespondado kun Moscheles (baldaŭ en Esperanto post iom en la germana) kaj Lawrence – pri kiu Zamenhof post kelkaj monatoj konstatis, ke ŝi ne estas “kara sinjoro”! – kaj en 1903, antaŭ la unua jarkunveno de la Londona Klubo, Zamenhof sendis fonografon de sia voĉo por saluti siajn “tre multe da varmegaj kaj sinceraj amikoj” kaj montris sian novan optimismon pri Esperanto en tiu insularo, precipe per “la noblaj kaj energiaj kondukantoj de la Londona Klubo Esperanta” kaj “tiu malgranda rondeto Esperantista en Keighley”.

1905 reprezentis la pinton de la jam plurjardeka zamenhofa laborado, per la starigo de la Internacia Kongreso en Bulonjo, kiun organizis Alfred Michaux, kiu gastigis la geedzojn Zamenhof dum ties unua vizito al Okcidenta Eŭropo. La firmao Hachette eĉ petis, ke la iniciatinto transloĝiĝu al Parizo kaj proponis pagi la kostojn – peto, kiun Zamenhof rifuzis, ĉar post dudek jaroj da

laborado li nur en la antaŭaj du-tri jaroj enspezis sufiĉe por kovri siajn elspezojn kaj ŝuldojn.

Plia spiritaltigo estis la novaĵo, ke li ricevos de la franca registaro la Ordenon de la Honora Legio. (Li ja ricevis la rubandon, kvankam oni ne trovas lian nomon en la listo de

ricevintoj. Oni konjektas, ke la rusa registaro, poste petita de la franca doni permeson, ke civitano ricevu la honoron, rifuzis.)

Zamenhof eĉ renkontis finfine tiujn amikojn britajn, kun kiuj li korespondadis dum la antaŭaj jaroj – ne nur ĉe la kongreso mem (kvankam

pluraj kompreneble ĉeestis) sed ĉar post la kongreso la geedzoj faris sian unuan marvojaĝon, de Kalezo al Dovero, post kio li kaj aliaj vizitis Folkestone, kie lin bonvenigis la prezidanto de la loka grupo.

Kion la historio tamen ne montras, estas, ke Zamenhof povus facile esti ne spertinta ion ajn de tiuj momentoj. En januaro 1905 li ricevis ordonon de sia milita



La portreto de Zamenhof, kiun pentris Moscheles en 1907. Ĝi nun pendas en Esperanto-Domo en Barlastono.

Zamenhof en sia laborĉambro, kie li pasigis horojn per korespondado, tradukado kaj komponado.



estraro forveturi al Manĉurio por deĵori kiel kuracisto tie, kie jam troviĝis liaj fratoj Felikso kaj Aleksandro. Li nur eskapis tiun devigon ĉar post kontrolo evidentiĝis al la milita estraro, ke lia “sano estas tro malforta”. Lia edzino klarigis al amikoj, ke li ne plu havas pulson en la piedoj. Eĉ junaĝe li devis prokrastigi lernejan jaron pro malbona sanstato.


Parolado en Londono

En la sekva jaro, 1906, liaj kuracistoj ordonis, ke li pasigu plurajn semajnojn en banurbo Bad Reinerz por resaniĝi. Tio fariĝis ĉiujara devigo, ĉu al Bad Nauheim, Bad Kissingen, Bad Salzbrunn, Neuenahr ... Sed trois la labor-

ŝarĝo. Reveninte hejmen post du monatoj ĉe Bad Reinerz li trovis, ke atendas lin 500 leteroj.

Lia plej videbla ligilo kun Britio videblis en 1907 okaze de la tria Internacia Kongreso, ĉi-foje en Kembriĝo. Li ĉeestis ne nur la kongreson mem, sed ankaŭ akceptiĝis ĉe Guildhall en Londono, kie li donis paroladon por eminentuloj, inkluzive de la urbestro, Sir Thomas Vesey Strong, kiu invitis lin. Intervjuo kun Zamenhof aperis ankaŭ en *Jewish Chronicle*.

Ne ĉio iris glate, tamen. La reformomanio kreskis dum la lastaj jaroj. Pri la Ido-krizo kaj la malantaŭa perfido oni povas legi amplekse plurloke. Eĉ en Britio tio



La lasta foto de Zamenhof, lacega kaj aspekte multe pli aĝa ol liaj 56 jaroj.

aperetis, kaj Zamenhof sentis necese skribi al la BEA en 1907, ke li aŭdis, ke iu Miller planas represi lian artikolon *Pri reformoj en Esperanto* de 1894 por doni la impreson, ke Zamenhof mem transiras al Ido, kaj peti, ke tiukaze la BEA “komencu en mia nomo leĝan persekutadon kontraŭ tiu persono”.

Por Zamenhof, jam malsana dum pluraj jaroj, la premo montriĝis kaj en 1908 li skribis, ke “venos la tempo, kiam mia laca kapo ne povos plu labori”. Formiĝis tiam la Universala Esperanto-Asocio (“la ideon de Hodler per si mem mi trovas bona”) kaj Zamenhof konfesis, ke li intencas ĉeesti neniun kongreson estontece, kvankam li fakte maltrafis neniun kaj estis survoje al la pariza en 1914, kiam ekflamis la mondmilito.

Restis por la lacegulo unu peza tasko. Li konstatis la mankon de la Biblio en Esperanto, kaj celis mem traduki la *Malnovan Testamenton*. Li skribis en januaro 1910 al pastro John Ciprian Rust por demandi, ĉu iu alia jam komencis la laboron, kaj post unu monato jam tradukis la unuajn ok ĉapitrojn. En letero al Rust li agnoskis sin tre kontenta lasi al la Biblia Komitato fari la ceteron; sed venis la respondo, ke la komitato preferas, ke li faru mem! Kaj tiel la malsanulo eksciis, kiel li pasigos la venontajn kelkajn jarojn. La kuracistoj daŭre volis, ke li ne plu laboru. Zamenhof eĉ sciigis en 1911, ke eĉ post kuracado en Bad Kissingen “mia pulso estas nun ankoraŭ mezonombre ĉirkaŭ 120 battoj en minuto”.

Melankolio

La tradukitaj ĉapitroj aperis unue libroforme ĉe Hachette, ĝis kontraktnuligo, kaj poste felietone en *La Revuo*. Deprimite, Zamenhof skribis al Mudie en 1913 por peti, ke li aranĝu privatan kontrakton por disdoni liajn verkojn. Mudie, lojala apostolo, aranĝis tian kontrakton ĉe la BEA, sed Zamenhof poste pardonpetis pro la “nepardonebla melankolio”, kiu influis lin, kaj petis revenon al la antaŭa stato por ne ĝeni aliajn. Mudie responde proponis privatan kontrakton inter si kaj Zamenhof,

La vivo de Ludoviko ne estis facila. Ne ĝis sia kvara jardeko li kapablis sin vivteni sen financa helpo de la bopatro. Li plurfoje en la vivo spertis melankolion kaj eĉ senesperon, antaŭvidante la kolapson aŭ sian retiriĝon de la projekto. Kun posta sukceso venis premo; en Francio li trovis amikojn, sed ankaŭ fariĝis pupo, kiun uzis kelkaj el la tieaj eminentuloj, ĝis finfina perfido.

Britio por li estis amikejo, kvankam li devis atendi ĝis oktobro 1902 – jam plene 15 jarojn post la publikigo de Esperanto – por regule korespondadi kun la tieuloj. Forĝiĝis forta ligilo inter li kaj, precipe, Moscheles kaj Mudie. Dum la Ido-krizo malaperis multaj de la ĉefuloj en Francio, sed restis firmaj liaj amikoj en Britio.

Zamenhof donis vivon al Esperanto. Ĝi reciproke maldonis vivon al li. Eĉ en sia junaĝo li ofte malsaniĝis. En la sukcesaj jaroj la kuracistoj ĉiam avertis lin ne plu labori. Liaj sennombraj horoj dediĉitaj al Esperanto sendube malplilongigis la vivon ... tamen faris lin senmorta. Vivo ne facila, jes – sed vivo ja vivinda.

kiu tion ankaŭ rifuzis. Evidentas, ke por tiuj bibliaj libroj Hachette taksis la merkaton eta: kvankam la firmao presis 3000 ekzemplojn de ĉiu libro, nur 500 ĝi bindigis. Tiom da laboro dum tiom da jaroj por tiom malmulte da legantoj.

Bona novaĝo atingis Zamenhofon en 1914, kiam li eksciis, ke la Biblia Komitato finfine konsentis disdoni la *Malnovan Testamenton*, per financa helpo de la fratinoj Algerina kaj Priscilla Peckover. La Biblia Komitato konsentis traduki kaj disdoni la *Novan Testamenton*. Zamenhof mem ne vivis sufiĉe longe por vidi la fruktojn; la Esperanta Biblio aperis kiel unu volumo nur en 1926, ĉe *British and Foreign Bible Society* kaj *National Bible Society of Scotland*. Ĝi ne enhavis la tekston verkitan de Zamenhof; ĝin poluris komitato.

Mizerajn lastajn jarojn havis

Zamenhof. Ĉirkaŭ li la mondo ne transformiĝis laŭ liaj esperoj, sed tute kontraŭe, kun industria amasbuĉado. Mortis, supozeble propramane, ĉe la fronto la plej juna frato, Aleksandro. Li ne dum jaroj ricevis novaĝojn de la filino Sofia, alilande kiam komenciĝis la milito, kaj devis peti letere al amikoj alilandaj, ĉu novaĝojn ili havas. Li kapablis ĉesi nek labori, nek fumi, malgraŭ pluraj provoj. Iel li sukcesis sendi tra Svisio leteron al Britio, kaj tiel aperis en *La Brita Esperantisto* lia “Alvoko al la diplomatistoj”, en kiu li petegis konstruon de iu nova kunlandaro, la “Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo”.

Ĝis la lasta tago li laboris, eĉ kiam li ne plu povis sidi ĉe sia skribtablo. Kaj subite la 14-an de aprilo 1917, dum sia edzino adiaŭis la ĵus vizitintan kuraciston, nur 57-jara “la majstro mortis”. ■

ANASO eniras drinkejon kaj eksaltas sur la vendotablon. Ĝi mendas pajnton da biero kaj ŝinkosandviĉon. La drinkejstro rigardas ĝin, kaj diras, “Unu momenton! Vi estas anaso!”

“Ŝajnas, ke viaj okuloj bone funkcias,” respondas la anaso.

“Kaj vi parolas!” ekkrias la drinkejstro.

“Ŝajnas, ke ankaŭ viaj oreloj bone funkcias,” respondas la anaso. “Nu, se ne ĝenus vin, ĉu vi bonvolus pretigi miajn bieron kaj sandviĉon?”

“Certe – pardonu min,” diras la drinkejstro, ĉerpante la bieron. “Mi volas diri nur, ke en ĉi tiu distrikto ni ne vidas multajn anasojn. Kion vi faras en la najbaraĵo?”

“Ho, mi laboras ĉe tiu konstrutereno,” klarigas la anaso, “trans la ĉefa vojo. Mi estas gipsisto.”

“Gipsisto?”

“Jes, mi ŝmiras gipson.”

La drinkejstro, ŝokita, apenaŭ kredas tion, kion diras la anaso, kaj volas eltrovi plu. Tamen, la anaso eltiras ĵurnalon el sia sako, kaj komencas legi ĝin. La drinkejstro tuj komprenas, kaj lasas la anason trankvila.

Post iom da tempo, ĝi fintrinkas la bieron, formanĝas la sandviĉon, kaj ĝisante la drinkejstron eliras el la loko.

Tio same okazas dum du semajnoj.

Unu tagon, jen alvenas en la urbon granda cirko. La cirkestro eniras la drinkejon kaj mendas bieron. La drinkejstro rigardas lian uniformon, kaj diras al li: “Vi estas cirkestro, ĉu ne? Nu, mi konas anason, kiu povus mirigi la ĉeestantaron en via cirko. Ĝi parolas, trinkas bieron, manĝas sandviĉojn, legas ĵurnalojn kaj ... kaj tiel plu!”

“Tio fakte ŝajnas interesegega,” respondas la cirkestro, donante al la drinkejstro sian nomkarton. “Igu ĝin telefoni al mi.”



*Pasero falas el arbo.
Flugiloj kaptas aeron.
Ĝi falflugas malalten
antaŭ ol ripozi denove.
Nun mi scias, ke ĝi similas al mi:
falanta tra momentojn.*

Jen poemo, kiun **Jack Edwards** verkis por sia disertacio, kies temo estis: “Ĉu aziaj poeziaj formoj funkcias en la angla?” Jack poste decidis provi unu el tiuj poemoj Esperante. Li verkis ĝin en la korea poezia formo “sijo”.

Do, la postan tagon, kiam la anaso envenas en la drinkejon, la estro diras al ĝi, “Hej, s-ro anaso, mi opinias, ke mi povas aranĝi por vi gravegan postenon. Vi ricevos grandegan salajron.”

“Hm. Mi ĉiam serĉas pli bonan okupon,” diras la anaso. “Kie mi devus labori?”

“En la cirko,” diras la drinkejestro.

“La cirko?” ripetas la anaso.

“Ĝuste,” respondas la drinkejestro.

“La cirko?” ripetas la anaso. “Kun grandega tendoo?”

“Jes ja,” respondas la drinkejestro.

“Kun tiom da bestoj, kiuj loĝas en kaĝoj? Kaj akrobatoj kaj klaŭnoj, kiuj loĝas en ruldomoj?” diras la anaso.

“Ĝuste,” respondas la drinkejestro.

“Kaj la tendegon oni faris el dika tolo? Kaj la muroj estas el tolo? Kaj la plafono – ankaŭ el tolo – estas tre, tre alta, kaj meze de la plafono estas granda truo?”

“Efektive!” diras la drinkejestro.

La anaso pensas dum momento, malrapide skuas la kapon, mirante, kaj diras ...

“Kial ili bezonus gipsoŝmiriston?” ■

Bridge of Words: Esperanto and the dream of a universal language. Esther Schor. New York: Metropolitan Books, 2016.

La libron mi antaŭĝuis dum pli ol unu jaro, rimarkinte ĝin ĉe *Amazon* por antaŭmendo. Saltis el la ekrano la bela kovrilo kaj liverdato antaŭkristnaska. Ricevis la peton Avo Frosto. Kaj post iom, mistere, malaperis la libro.

Kiam, post unu jaro, ĝi reaperis mi denove antaŭĝuis. Libroj pri Esperanto bele prezentitaj ja estas novaĵoj. Kaj tiam mi legis la komencon de la unua priskriba frazo: *En 1887, Ludoviko Lazaro Zamenhof, pola judo ...*

Ho, kia seniluziigo post la frua ekinteresiigo! Zamenhof mem estis tute klara pri tiu punkto en letero sendita al la Loka Kongresa Komitato de la Krakova Kongreso en 1912: “ ... ne nomu min “polo” ... popolo, al kiu mi ne apartenas.” Jes, pli vaste daŭre uziĝas (kaj ŝajne konkretiĝis) la malĝusta aserto, ke Zamenhof estis pola, sed en faka libro pri Esperanto, tiaĵojn oni ne renkontu.

Do, mi malrekomendas la libron, ĉu ne? Tute ne! Pliajn tiaĵojn mi ne rimarkis. Rimarkiĝis tamen, ke Esther Schor vortumas bele,

rakontante pri la naskiĝo kaj adolesko de Esperanto (jam konataj per aliaj libroj), ĝis la nuna tago (daŭre mistera, ĉar ne

raportita). Kaj ŝi bone konas kaj Esperanton kaj esperantistojn.



Ni renkontas tra la libro la frutempajn ideojn kaj homojn. Jes ja, Zamenhof kaj Idon, kompreneble, sed ne nur. Aperas Lanti, Lidja, Eroŝenko, kaj ankaŭ homoj al mi ĝis legado tute nekonataj: Ooyama Tokio kaj Hasegawa Teru, kiuj ambaŭ uzis Esperanton por protesti la japanan registaron. (Ooyama edziĝis al koreino kaj celis protekti la korean lingvon kaj plibonigi rilatojn inter Koreio, tiam kolonio de Japanio, kaj la koloniiginta lando. Teru edziniĝis al ĉina studento kaj transloĝiĝis kun li en Ĉinion.) Daŭre restas tiom por lerni pri la unuaj 50 jaroj de Esperanto, precipe ekster Eŭropo!

Sed la vere nova kontribuo de tiu libro estas, ke ĝi ne haltas ĉe la gloraj tagoj. Kaj jen la kialo por la prokrasto. Tutunue la aŭtoro ja celis aldoni plian biografion pri Zamenhof al la ekzistantaj, sed dum la esplorado ŝi partoprenis kunvenojn etajn kaj grandajn, kaj persone parolis kun centoj da Esperantistoj. Kaj tiel la libro

Ĉiu vertikala kolumno, ĉiu horizontala vico kaj ĉiu 9-ĉela latiso enhavu la jenajn 9 literojn:

LZAMENHOF


Kaj ĉiu litero aperu nur unu fojon en ĉiu kolumno, vico aŭ latiso, tiele:



Se vi preferas ne skribi sur vian ekzempleron, vi povas elŝuti la enigmon de lbesp.org/literdoku-1.

La solvo troviĝas en paĝo 45.

fariĝis “bibliografio ... de la Esperanto-komunumo, kaj raporto el ĝiaj tranĉeoj.” Tiel kaj tial ankaŭ ni renkontas tiujn Esperantistojn. Kelkajn ni rekonos nome (Anna Lowenstein, JoMo, Humphrey Tonkin), aliajn laŭ priskribo malgraŭ la uzo de kaŝnomoj (Bertilo Wennergren).



Plej grave estas, ke aperas en la libro nomoj, kiuj por ni estas tute novaj: la homoj el Uzbekio aŭ Brazilo; la novuloj ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro; eĉ la stabo kaj infanoj de la orfejo Bona Espero.

Ĉi-foje la libron oni povas juĝi laŭ la (bela) kovrilo, kaj mi ĝojas, ke Avo Frosto memoris mian antaŭjaran originan interesiĝon.

Mi rekomendas. ■

La vilaĝo, al kiu blovas la vento. Omori Kazuyoshi, Uehara Tokuji. Japana Esperanto-Instituto: Hirakawa Kogyosha 2014. Havebla ĉe UEA por €8,70 + afranko €6,00.

ĈI TIU bildrakonto aperis en Obama ĉe la 101-a Japana Esperanto-Kongreso, kies ĉeftemo estis “Ni akordu trans la Maro”. Aŭtoro, ilustristo kaj tradukisto estas ĉiuj enloĝantoj de la urbo, kiu troviĝas ĉirkaŭ 50 kilometrojn norde de Kioto. Fonto de la libro estis konata akcidento okazinta antaŭ pli ol cent jaroj.

En la jaro 1900, kiam ankoraŭ mankis iaj elektraj komunikiloj surmare, la *Sainbanĝe*, ligna ŝipo el Koreio, rompiĝis laŭ la okcidenta marbordo de Japanio. Lokanoj el apuda vilaĝeto savis 93 koreajn ŝipanojn kaj gastigis ilin dum 8 tagoj. Poste la maristoj vojaĝis hejmen per vagonaro kaj vapor-ŝipoj. Monumento en loka parko memoras pri la evento. Oni eĉ retenis la ŝnuron, kiu ligis la korean ŝipon.

La libreto priskribas la malfacilaĵojn kaj de gastoj kaj de gastigantoj. Ne estis facile trovi sufiĉe da rizo por tiom da homoj. Pro manko de komuna lingvo necesis komuniki per ĉinaj ideogramoj skribitaj surpapere.

Nur tiel la koreoj eksciis, ke ili atingis Japanion. Kelkaj koreaj kutimoj ĝenis la japanojn. Ili foje kraĉis en la fornon, kiu por japanoj estis sankta loko kaj hejmo de la Fajro-Dio; kaj ili ne demetis la zoriojn antaŭ ol eniri la ĉambrojn de la domo. Tamen japanoj kaj koreoj iom post iom amikiĝis, kaj je la tago de forvojaĝo ambaŭ havis larmojn en la okuloj.

Teksto aperas rekte sur la belaj plenpaĝaj ilustraĵoj, laŭ la stilo de infanlibro. Ene de la antaŭa kovrilo aperas mapo de la marbordoj de Koreio kaj Japanio, sur kiu oni bedaŭrinde ne esperantigis la loknomojn. Instruplene sed neatendite estas, ke la nordo situas ne je la supro de la paĝo sed en ties malsupra, maldekstra angulo. Ene de la malantaŭa kovrilo estas la dankletero, kiun skribis la koreoj al la vilaĝanoj. Tre plaĉas la bildoj, kun detaloj spegulantaj la viv- kaj vest-manierojn de la homoj el ambaŭ landoj.

Mi rekomendas la libron kiel legaĵon por progresanta Esperantorondo, ĉe kiu la temo de transmara amikeco, malgraŭ kulturaj kaj lingvaj malsimilaĵoj, ankoraŭ trovas eĥon. Sed indas numeri la paĝojn de 1 ĝis 32, antaŭ ol uzi ĝin tiel. ■

ESTAS apenaŭ imageble, kiel dum la 30-aj jaroj Germana Esperanto-Asocio luktis kaj tordiĝis, provante konvinki la instancojn, ke tamen ĝiaj celoj ne kontraŭas tiujn de la Naci-Socialisma (nazia) Partio. Ĝi faris ĉion fareblan por pruvi, ke interesiĝo pri Esperanto ne signifas mankon de germana patriotismo, kaj purigis sian membraron ne nur je judoj, sed ankaŭ je komunistoj kaj aliaj, kiuj montris sian kontraŭstaron al la reĝimo.

En oktobro 1933 *Germana Esperantisto* publikigis plurpaĝan tradukon de parolado de Hitler, dum la Esperanto-Unuiĝo de Saksaj Geinstruistoj eldonis informilon *La Nova Germanlando*, kiu estis dissendita al sepdek landoj. Laŭ Lins, aŭtoro de *La danĝera lingvo*: “[...] tiu ĉi pamfleto apartenas pro sia klare kontraŭjuda tendenco al la plej fiaj presaĵoj iam eldonitaj en la lingvo de Zamenhof.” (p. 92)

Tio, kio estas nekomprenebla por nuntempa leganto, estas kiel la estraranoj de GEA povis samtempe kombini tian pensadon kun amo al Esperanto – kaj, cetere, kiel ili klarigis al si la fakton, kiun ili preferis ne elstarigi, ke la lingvo estas kreita de judo. Ĝojiga estas

La danĝera lingvo: studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, nova reviziita eldono.
Ulrich Lins. UEA: Rotterdam, 2016.

tamen la konstato, ke kiam la Esperanto-grupo en Magdeburg en 1934 aldonis al sia statuto la paragrafon, ke ne-arjoj (tio estas: judoj) ne rajtas membriĝi en la asocio, kvarono de ĝiaj membroj tuj propravole eksiĝis.

Kaj tamen tiuj instancoj, kiuj tiom timis Esperanton, ne malpravus. Evidente la esperantisma idealo ebligis justan komunikadon kaj interkompreniĝon inter la popoloj estis la absoluta malo de la nazia kredo, ke la ĝermana raso estas supera al ĉiuj aliaj.

Ĉi tiu libro priskribas periodon, kiun nur la plej maljunaj homoj ankoraŭ memoras – kaj tamen, kiam oni aŭdas, ekzemple, ke la urbaj instancoj de Bjalistoko ne plu volas honori unu el siaj plej famaj filoj, ŝajnas, ke la okazaĵoj rakontitaj en ĉi tiu libro ne plu rilatas al fora pasinteco, sed fariĝas timige aktualaj.

Estas paradoksa afero, ke kiam oni komencas persekuti Esperanton, tio en si mem estas la pruvo pri ĝia sukceso. La patro de Zamenhof persvadis la cenzuriston

aprobi publikigon de la Unua Libro per la insisto, ke ĝi estas “nedanĝera sensenaĵo”. Sed post kelkaj jaroj la instancoj komencis rimarki, ke tamen Esperanto ne estas nura stultaĵeto, sed vere funkcia lingvo, kiu efektive faciligas kontaktojn inter rusoj kaj eksterlandanoj, kaj tiel enportas ideojn danĝerajn (laŭ ili) el eksterlando.

En la postrevolucia fervoro la sovetaĵ instancoj aktive kuraĝigis korespondadon en Esperanto inter sovetaĵ kaj eksterlandaj laboristoj, kaj miloj da leteroj estis tradukitaj por la nacilingvaj gazetoj. Okazis ankaŭ vizitoj de alilandaj kamaradoj, kaj denove Esperanto ludis esencan rolon. Tamen iom post iom la instancoj konstatis, ke tiu tro facila komunikado havas ankaŭ nedeziratajn sekvojn. Povante skribi libere inter si, okcidentaj laboristoj komencas starigi tro tiklajn demandojn al siaj rusaj kamaradoj. Fine de la 20-aj jaroj Sovetlanda Esperantista Unuiĝo



(SEU) ne plu favoris individuan korespondadon, sed organizis kunvenojn, en kiuj oni kolektive diskutis, kiel respondi al ricevitaj leteroj laŭ aprobitaj ŝablonoj.

Tragedia estis la sorto de tiuj sovetaĵ esperantistoj, kiuj malaperis dum la Granda Purigado de 1937 kaj 1938.

Ĝenerale ilia “krimo” estis kontaktoj kun eksterlandanoj, kio en si mem ne estis kontraŭleĝa kaj kelkajn jarojn pli frue estis eĉ aktive kuraĝigata, do ili ne komprenis ĝis la lasta minuto, kial ili estis senaverte arestitaj. Inter ili estis Ernest Drezen, la prezidanto de SEU, kiu heroe strebis adapti la politikon de la asocio al ĉiu

nova zigzago de la oficiala soveta lingvopolitiko. Ne nur esperantisto, sed ankaŭ sincera komunisto, li estis mortpafita en 1937.

Ĉi tiu libro kun sia densa teksto kaj aro da piednotoj en ĉiu paĝo sendube donos al multaj leguntoj terure timigan impreson. Mi mem dum jaroj neniam kuraĝis fronti ĝin, ĝis mi finfine eklegis ĝin kadre

de la Esperanto-sumoo. Por aliaj hezitemuloj, mia rekomendo estas: legu rapide, ne tro enmarĉiĝu ĉe detaloj, kaj vi trovos rakonton nekredible atentokaptan kaj instruan. Per ĉi tiu libro vi multe lernos ne nur pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, sed ankaŭ pri la fruaj historio kaj evoluo de la Movado.

Ĉi tiu nova eldono estas funde reviziita, prenante en konsideron nove disponeblajn dokumentojn el la soveta periodo, kaj aliajn esplorojn intertempe aperintajn. Kelkaj partoj estas koncizigitaj,

precipe rilate al la soveta movado, sed la sekcio “Persekutoj en orienta Azio” estas entute forigita. La aŭtoro klarigas en sia enkonduko, ke tiuj persekutoj rilatis unuavice ne al Esperanto mem, sed al la politika agado de ĝiaj adeptoj. Tiel li bedaŭrinde malaperigis interesan ĉapitron el la historio de nia lingvo, kiu almenaŭ al la plejmulto da okcidentaj esperantistoj estas apenaŭ konata. Kvankam la koncizigo certe faciligas la aliron por ĝenerala leganto, seriozaj esploristoj povus preferi la unuan, pli detalriĉan eldonon. ■

Nova redaktoro?

DUM 25 jaroj redaktis *La Britan Esperantiston* William Auld. Lin sekvis dum 15 jaroj Paul Gubbins.

La antaŭuloj estis ja diligentaj kaj talentaj, sed ne eternaj. *La Brita Esperantisto*, starigita en 1905, bezonas novan redaktoron por pluvivi estontecen.

Se vi interesiĝas pri la rolo, bonvolu kontakti aŭ Tim Owen tim.owen@esperanto.org.uk aŭ Ian Carter ian.carter@esperanto.org.uk. ■



Jen la solvo de la literdoku-enigmo en paĝo 41.



IAM, kiam la mondo ankoraŭ ne tute verdiĝis, la esperanta flago flirtis super la fekundaj kampoj de nur plenmano da landoj, konataj kune kiel Esperanto-Unio (EU), kies diversdevenaj loĝantoj kunvivis pace kaj feliĉe. Ili estis diversaj je koloro, formo, voĉo kaj karaktero, sed ĉiuj parolis la saman lingvon, kaj celis la saman ĝentilan kaj helpeman sintenon unu kun la alia. La virinoj belis, la viroj fortis, la infanoj bonfartis kaj la krimuloj elmigris. Eĉ la birdoj lernis ne kanti tro frumatene ekster la fenestroj de la malfruvekiĝemuloj, por ilin ne ĝeni.

Trans mallarĝa strio de akvo, nomita Norda Maro, troviĝis Unuiĝinta Reĝlando de Krokodilujo (UK), insulo loĝata de neesperanta gento de krokodiloj el tri diversaj genaj specoj, kiu jam de longe elektis sendependecon, prefere al aparteneco al la Unio, kaj nun senhonte paradis pri siaj kontraŭ-Uniaj rajtoj, anstataŭigante ĉiajn esperantajn per la propraj indiĝenaj (iom malnoviĝintaj) substituaĵoj. Tiel oni starigis en tiu insulo apartajn

Foliumante la forajn angulojn de la historilibroj pri Esperantujo, la aglokula esperantologo de la estonteco eble legos pri epoko malmulte konata, sed sufiĉe influa por la venonta disvastiĝo de la lingvo tutmonde. Li ĝin trovos tuj post la ĉapitro pri la tiel nomata “Pogomoja epoko” de esperanta historio (laŭ la inicialoj de du el ĝiaj elstaraj figuroj), sub la enigma subtitolo “La Afero de la Verda Krokodilo”.

Ĉu temas pri vera okazintaĵo aŭ nur fablo, la leganto decidu. Jen la rakonto...

registaron, regularon, valuton, kaj tute rifuzis paroli Esperanton; ĉio tio ege malfaciligis intertraktadon kun Uniaj landoj (kaj cetere naskis en la esperantistaro la terminon “krokodili”).

Fakte, tiel kontraŭesperanta estis la etoso tie, ke oni eĉ ne volis uzi unuopan komunan krokonacian* lingvon pro timo, ke tia tro similus al la malplaĉa kreaĵo de la transmaraj najbaroj. Do anoj de la tri diversaj krokospecoj parolis ĉiuj la propran lingvon, kiel eble plej malsimilan al Esperanto, kaj – ĉefe – tute nekompreneblan al ĉiuj aliaj; tio igis UK-on (laŭ la fiera fanfaronado de la krokopolitika elito) la plej kontraŭesperanta insulo ekster la Unio, kaj ideala modelo sekvenda de aliaj ne-EU-aj nacioj.

* *La verkinto uzas kroko- por mallonge signifi krokodil-.*



La tri diversaj genaj specoj de krokodiloj en UK loĝis en diversaj partoj de la insulo: en la nordo troviĝis la blusangaj krokodiloj (kiuj devenis el Rivero Nilo Blua); en la sudo loĝis la ruĝsanga speco (el Ruĝa Maro), kaj la okcidenta parto de la insulo estis la krokoloko de la flavsanga krokodilaro (originale el Rivero Flava en Ĉinujo). Tamen la sangokoloro ne atingis eksteren. Aspekto ili ĉiuj havis la saman kotbrunan haŭton, kaj tiel estis nedistingeblaj unu de la aliaj. Tio kaŭzis multan konfuzon kaj ĉagrenon, ĉar renkontante nekonatulon oni neniam sciis, kiu tiu estas sufiĉe frue por eviti ofendon.

La praa etiketo en UK postulis, ke en tiu cirkonstanco oni salutu ungovundetante unu la alian, tiel eligante etan kvanton da sango, kiu montros la identecon de la renkontito. (Parenteze, tial la haŭto de krokodiloj ĉie estas krude malglata, pro la cikatroj.

Krokopsikologoj diras, ke ju pli da cikatroj havas individuo, des pli societema estas tiu.) Se renkontito montriĝis samsanga amiko, oni povis daŭrigi la konversacion lingve – se ne, temis pri miksaĵo de gestoj, mienoj, grimacoj kaj skribaĉitaj desegnaĵoj sur apuda surfaco, por diveni la intencon de la alia. Foje tiaj krokokomikaĵoj nur amuzis, aliffoje oni trovis ilin temporabaj kaj frustraj – kaj eĉ dolorigaj, kiam forgesemuloj preteratentis la nepran ĉiumatenan ungotondadon.

Transmara burokrataro

Tamen la sistemo funkciis sufiĉe bone tiel, ke la plimulto tute ne deziris – eĉ pripensis – ĝeni sin ŝanĝiĝi aŭ lerni strangan artefaritan lingvon indiĝenan al neniu. Kaj la gazetaro bonege plenumis sian komision tage memori ĉiujn pri la profitoj de sendependeco – profitoj ekonomiaj, komercaj, sociaj – kiuj certe iam montros sin estontece... La superregaj ruĝsangaj krokodiloj malŝatis la ideon subiĝi sub la regado de senvizaĝa transmara burokrataro; la blusanguloj iom ŝatus reunuiĝon, sed estis tro malmultnombraj por kontraŭstari la institucian vidpunkton; kaj la flavriveraj loĝantoj estis tute okupitaj komplote la propran sendependiĝadon for de la ruĝsanga registaro, kaj ne zorgis pri io alia.

Tamen unu regulo unuigis ĉiujn krokodilojn en la insulo. Laŭ longedaŭra interkonsento oni neniam havu intimajn rilatojn interkolorajn, pro timo pri hibridiĝo kaj ties neimageblaj sekvoj. Kaj tia estas la potenco de tabuoj kateni sociojn en la mallarĝa vojo de konveno, kaj tiel reteni la socian ordon, ke la historio de Krokodilujo tute malplenis je ekzemploj de tia ago. La nepenseblaĵoj facile tradukiĝas al la nefareblaĵoj.

Koko kaj Doko

Kaj tiel eble daŭrus la situacio, se ne okazus stranga tordiĝo de la sorto, kiu hazarde kunigis junan flavsangan krokodokoron nomitan Doko, kaj belan blusangan krokodilanon nomitan Koko, kies krokokemio kune estis tiel potenca kaj subita, ke ili forgesis la konvenajn ĝentilaĵojn, preteratentis la nepenseblan tabuon kaj la timon pri sekvoj, kaj tuj saltis kune en la koton ĉe la rivera fundo (kien, kiel ĉiu lerneja krokodileto informos vin kun subrido, oni iras por krei krokobebojn). Tie ili interkomunik-iĝis longe kaj arde, uzante la plej internacian lingvon en la mondo.

Nur poste, kiam li demandis al ŝi, kie ŝi loĝas, kaj ŝi respondis, ke ŝi preferas la siajn gustigitaj per ĉokolado, ili konstatis la eraron – ili jam faris la gravan mispaŝon kuniĝi kun alisankolorulo. Plenaj je hororo

ili haste elpensis planon (ĉiu en la propra lingvo), tiam decidis unu kun la alia, geste kaj grimace, ke ili apartiĝu kaj ŝajnigu, ke la malsaĝaĵo ne okazis. Do kun la amo ankoraŭ en la koroj ili mangestis siajn adiaŭojn, kaj daŭrigis la vivojn kvazaŭ nekonatuloj.

Tamen pasis ilia kotokovrita krokerotikado ne senrezulte, kaj post certa tempodaŭro naskis Koko vigran bebon brunhaŭtan, belmianan kaj ŝajne normalan ĉiurespekte... escepte de tio, ke la sango de la bebo montriĝis nek flava, kiel tiu de la patro, nek blua, kiel tiu de la patrino, eĉ nek ruĝa, sed de koloro tute nekonata en la genaro de krokodiloj – verda! Feliĉe la patrina impulso superis la konsterniĝon pro la fremdeco de ŝia ido, kaj Koko provis kiom eble protekti sian etulon for de la tumultaj ludobataloj kaj provungo-vundetoj de liaj samaĝuloj, for de la scivolemaj demandoj de aliaj patrinoj pri la patro, kaj for de la krokoklaĉemuloj kaj kroko-mokemuloj, kiuj avide emus kaptosalti je tia strangaĵo, kiel brulaĵo por ilia malica malutilo.

Tamen kun la pasado de la infanjaroj la ŝajnigo de normaleco iĝis pli kaj pli neebla, ĉar evidentiĝis, ke la verdeco de la sango de ŝia filo ne restis kaŝita, sed iom post iom, jaron post jaro etendiĝis eksteren, ĝis la haŭto

ekŝanĝiĝis de la normala kotbruno al la plej bela turkiskoloro, kaj la okuloj brilis kiel smeraldoj. Do la strangeco de la krokoknabeto estis malkovrita, kaj li devis elporti la afliktojn kutimajn al ĉiu ekster-normulo: la malakcepton kaj pikmokadon, la tiranadon en la ludejo, la suspektemajn ekrigardojn eĉ de siaj kamaradoj kaj proksimaj konatuloj. Sed kiom ajn stranga estis la aspekto de la knabo, tiom pli konsterna estis lia kreskanta inklino al ĉiaj esperantaĵoj.

Ĉiun naskiĝdatrevenon, Kristnaskon, feston kaj okazon li petegis ricevi nur esperantaĵojn – esperantajn librojn, T-ĉemizojn, ŝildetojn, gazetojn, ludojn kaj pupojn. Li studis esperantajn historion kaj politikon, ekonomion kaj filozofion, kaj sciis sufiĉe multe pri la komplikaĵoj de la landlimaj kontroloj inter UK kaj EU por eĉ ne peti, ke li vizitu tiun landaron de siaj revoj. Sed li daŭre pridemandis sian patrinon: “Kial ni ne apartenas al EU?” Kaj ŝi respondadis – ne sen iom da kunsento – ke ŝi ne scias, sed la afero estas jam decidita, do jen la situacio.

Tiaj respondoj ne kontentigis la scivoleman turkiskoloran kroko-knabon kun la smeraldaj okuloj. Kiel junulo li faris ĉion eblan por ŝanĝi la opinion de siaj kontraŭ-Uniistaj konatuloj, kaj instigi sufiĉan publikan subtenon por okazigi

referendumon por eniro en la Union, sed li ne sukcesis. Oni ŝatis la propran suverenecon, kaj ne volis, ke la insulo lasu al ia fremdularo decidojn pri siaj aferoj. Kaj oni certe ne volis paroli tiun stultan lingvon.

Tuta teatra trupo

Sed la knabo ne rezignis sian celon. Kiel juna plenkreskulo li starigis por-esperantajn kampanjojn, parolis kun politikistoj, leterskribis al la ĵurnaloj, eĉ aperis en krokodila televidelsendo – sed nenio utilis por ŝanĝi la obstinan kontraŭaligĝan etoson de liaj samlandanoj. Spite al la malfacilaĵoj li nun vojaĝis ofte trans la maron al Esperantujo, reportis ĉiaspecajn esperantaĵojn, librojn – eĉ tutan esperantistan teatran trupon – al la insulo, kun la espero tiel malplifremdigi esperantistecon por la krokodilaro. Kaj ankoraŭ li malsukcesis.

La juna turkisblua krokodilo kun la smeraldaj okuloj kaj verda sango sciis sendube, ke Krokodilujo estus plibonhava, se ĝi apartenus al la Unio, sed klare necesis alia metodo persvadi la loĝantaron al lia vidpunkto. Do li redirektis siajn pensojn tien kaj tien, antaŭen kaj malantaŭen, supren kaj malsupren; li sendis ilin dekstren kaj maldekstren, en cirkloj, spiraloj kaj elipsoj; li pensis serpentforme, konikforme, zigzage, inversigite,

rekte, kurbe kaj ronde – ĝis fine venis al li tutklare lia sekva paŝo. Li ĉesis sian politikan kampanjadon, transdonis estrecon de sia Verda Partio al la sola alia membro (sia patrino) kaj retiris sin for de la publika rigardo, kaj la brua kritikado de la krokodiladumuloj. Tiam li starigis sin kiel komerciston specialiĝintan en la interlanda eksport-importado de varoj.

En tiu entrepreno li rapide sukcesis kaj prosperis. Ĉiuj landoj en EU volis negoci kun la verda junulo, prefere ol kun la aliaj krokokomercistoj, ĉar tiu parolis Esperanton, kio ege pligliatigis aferojn. Ĉiu ricevis precize la varojn, kiujn tiu mendis; ne plu oni petis sapon kaj malpakis panon, aŭ sendis buteron al lando atendanta betonon. Post unu jaro la juna verdsanga entreprenisto jam al si amasigis sian unuan milionon. Kelkaj el liaj krokamikoj rezignis sian mokadon kaj ekatentis.

Krokomilionulo

Tiun milionon li investis ne en la hejmlanda krokobanko, sed en esperoj – la valuto de EU – kaj dum la sekva jaro li rigardis sian monon duoblīgi tiel, ke post la dua jaro li jam akumulis sian duan milionon. Aro da krokokonatuloj petis de li konsilon pri la propraj komercaj entrepreno. Per tiu mono li tiam aĉetis terhavajon en ĉiu el la EU-

landoj, prikonstruigis ilin, kaj post plia jaro li denove duobligis sian riĉaĵon ĝis kvar milionoj. Li ricevis festajn invitojn de siaj ekskontraŭuloj, kiuj volis nun ekamikiĝi kun li.

Li vizitis Afrikon, la kontinenton de liaj krokoprauloj, kaj trovis tie loĝantaron malriĉegan, sed pro tio avidan lerni Esperanton, lertiĝi en komercado kaj partopreni en la profitdonaj projektoj de la juna krokoplurmilionulo. Post plia jaro li kreis tie tutan komercan imperion, kiu etendiĝis de unu marbordo ĝis la alia, transformis la vivojn de miloj de siaj afrikaj dungitoj kaj multobligis la propran riĉaĵon. Oni donis al li la honorigan afrikan titolon, kiu tradukiĝas al “La Verda Krokodilo”, kaj rakontoj pri tiu eminenta krokodilestro abundis en ĉiuj afrikaj ŝtatoj. En ĉiuj lernejoj la infanoj strebis sukcesi en sia studado, ĉar ĉiu aspiris simili al tiu legenda figuro, kaj la plej malmodestaj uletoj kuniĝis grupe por plani la starigon de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Esperantigita Afriko, kiam ili plenkreskos.

Kiam la Verda Krokodilo revenis al UK, lin elserĉis la tuta kroko-komerca komunumo, kun siaj multekostaj edzinoj kaj monavidaj filinoj, kiuj petegis, ke li iĝu ilia komerca krokokonsilanto. Al tio li konsentis – kontraŭ konsiderinda honorario – kaj tiel li trovis sin en la

ege kontentiga situacio, en kiu oni pagis al li grandajn monsumojn kontraŭ instruado en la lingvo, kiun li amis. Tio ebligis, ke li iĝis la plej riĉa krokodilo en la tuta historio de krokodiloj – kaj tial la plej potenca kaj influa. Pro la grandeco de sia riĉaĵo li povis fari ian ajn proponon politikan, kaj la Gravuloj aŭskultis, konsentis kaj agis.

Senbrida ĝojo

Kaj nun, kiam la plenkreska, belaspekta krokodilo kun la verda sango, turkisblua haŭto kaj smeraldaj okuloj denove elpaŝis publike pri la profitoj de aniĝo al Esperanto-Unio – ĝuste kiel li jam faris, kiel nekonata, senmona junaĝulo – ĉiuj subtenis lian proponon kun senbrida ĝojo. Pro la propraj efektivaj sukcesoj, pro kiuj ĉiuj lin enviis, li jam montris la verecon de siaj argumentoj. La loĝantaro – kaj blusanga, flavsanga kaj ruĝsanga – bruegis por nova referendumo pri la demando, kaj kiam tiu okazis, ili voĉdonis unuanime favore al la aniĝo.

Do oni konstruigis ponton super la maro inter UK kaj EU, kaj realan kaj metaforan. La tuta krokodilaro lernis la lingvon Esperanto, trovis ĝin surprize facila, kaj kulpigis ĉiun alian pri la prokrasto de la procezo. Floris tien kaj reen trans la ponton libera komercado, informoj kaj interŝanĝo de kulturaĵoj, kio pliriĉigis ĉiujn en la Unio.

Kaj mi ĝojus, se mi povus informi vin, kara leganto, ke nia klera, verda esperantista krokodilo trovis belan edzinon, kiu enmondigis plurajn turkiskolorajn idojn, ĉiujn kun verda sango kaj esperantistaj inklinoj – sed mi ne povas tion fari. Nian krokoheroon tro okupis la instruado de esperantaj krokopolitikaj aferoj, ke li pasigu la tempon postulatan de la moderna krokodilinaro por antaŭgeedziĝa amindumado. Tamen se, en sia transmonda komerca vojaĝado li ie-tie amikiĝis kun ia ekzotika krokodilino, kiu logis lin en sian vilaĝan kotlage-ton nokte – nu, ni ne domaĝos al li la pasantan distraĵon, ĉar ne estas la esperantista maniero rifuzi la lokan gastamon, ĉu? ■



KUN GRANDA bedaŭro mi aŭdis pri la forpaso de Grietje Buttinger, 92-jaraĝa, je la 28-a de februaro 2017.

S-ino Buttinger (mi neniam alparolis ŝin "Grietje"!) naskiĝis Grietje Hasima la 27-an de oktobro 1924 en Drachten,

Nederlando. Ŝi renkontis Philip Buttinger en 1940 kaj venis al Anglujo en majo 1948 por edziniĝi al li. La geedzparo zorgis entute naŭ infanojn (Willem, Annie, Philip, Ilona, Jan, Max, Tina, Aminda kaj Patricia), kaj la familio loĝis en granda domo en

Dafforne Road, Tooting, Londono.

Post la esperantistiĝo de Philip, li kaj s-ino Buttinger komencis gastigi esperantistojn el la tuta mondo. Dum la jardekoj, pli ol 4000 homoj gastis ĉe ili kontraŭ tre modesta kosto. Post la morto de Philip kaj ankaŭ post transloĝiĝo al alia domo en Tooting, s-ino Buttinger daŭrigis la gastigadon, ricevinte en 2013 de la Universala Esperanto-Asocio (ĉe la Universala Kongreso en Rejkjaviko) Diplomon



pri Elstara Agado.

Mi unue gastis ĉe ŝi en 1973, survoje al miaj unuaj kongresoj – la Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo kaj la Universala Kongreso en Beogrado. Ekde tiam mi multfoje gastis ĉe ŝi, kaj ŝi ĉiam

afable bonvenigis min. Ŝi estis malgranda virino sed mi ĉiam miris pri ŝia forto. Kiam ŝi estis pli ol 80-jara kaj volis transloĝiĝi, ŝi pacience atendis, ĝis la ĝusta domo aperis en Tooting, ĉar ŝi volis sufiĉe grandan enirejon por parkumi sian biciklon.

En tiu nova domo mi memoras, ke ŝi prenis mian sakon por senpense kunporti ĝin supren kaj poste saltis sur seĝon por malfermi altan fenestron. Ŝi diris al mi "La hodiaŭa junularo ne scias, kio estas forta laboro. Kiam mi estis tre juna, mi devis melki la bovinojn, antaŭ ol mi iris al la lernejo, kaj devis denove melki ilin post mia reveno."

Ĉarma, afabla kaj nekredible sindonema, s-ino Buttinger restos heroino mia en Esperantujo. ■

NI TRE bedaŭras la morton de Muriel Shackleton je la 26-a de novembro, en flegejo apud ŝia hejmo en Bradford.

Ŝi naskiĝis – kiel Muriel Gill – en 1928 en Wibsey, vilaĝo rande de Bradford. Forlasinte la lernejon kun dek kvar jaroj, ŝi laboris ĉe teksaĵ-entrepreno kaj vespere studis steno-grafion, librotenadon kaj tajpadon. Post la dua mondmilito ŝi laboris ĉe Lancasters, firmao kiu liveris aŭtomatojn al amuzejoj, ĝis 1965, kaj atingis la rangon de oficejestro.

Ĉirkaŭ 1950 ŝi ekinteresiĝis pri Esperanto. Ĉe kunvenoj tiam regis formala etoso, sen antaŭnomoj; pli aĝaj kaj spertaj homoj gvidis aferojn. Tamen ili sufiĉe respektis ŝin por alparoli ŝin kiel “samideano Gill”. Inter ŝiaj amikoj estis Audrey Duerden, kaj ili ambaŭ helpis organizi la UK-on en Harrogate en 1961 kaj jarojn poste la Britan Kongreson tie en 1981.

Muriel daŭre aktivis en la Jorkŝira Federacio, deĵorante kiel protokolisto, sekretario kaj

prezidanto; kaj dum jardekoj ŝi gvidis la bradfordan lokan grupon. Ŝi forte subtenis la regionan revuon *La Blankan Rozon* per artikoloj, vortenigmoj, poemoj kaj desegnoj de la kamparo. Ŝia lasta kontribuo – kvizo pri Jorkŝiro –

aperis en printempo 2016.

La kamparon Muriel ja ŝatis, piedvagante kaj tranoktante en junulgastejoj. Tiel ŝi renkontis sian estontan edzon. Vojaĝado kaj la naturo estis ŝiaj ĉefaj ŝatokupoj kaj provizis la fonon de ŝiaj artikoloj kaj poemoj. Ŝi ĉeestis

la Centjariĝan Jubileon en Varsovio en 1987 kaj flegis kontaktojn kun esperantistoj el interalie Francio kaj Norvegio. Dum pluraj jaroj ŝi redaktis la bultenon de la Jorkŝira Dialekto-Asocio. En 2016, antaŭ ol malsaniĝi, ŝi verkis dialektan poemon pri siaj memoroj de Wibsey.

Dum pluraj jaroj Muriel ĉeestis la Somerlernejojn, unue en Barlastono kaj poste ĉe Shallowford House, ĝis sanproblemoj malebligis al ŝi vojaĝi vagonare. David Kelso,



LA 14-AN de novembro 2016, post longa malsano, forpasis Katelina Halo en la aĝo de 92 jaroj. Ŝi dum jardekoj diversmaniere kontribuadis al Esperanto tiom, ke la Universala Esperanto-Asocio agnoskis ŝin honora membro.

Kathleen Mary “Kate” Hall (esperantigita kiel “Katelina Halo”) naskiĝis en Mitcham, Surrey la 28-an de januaro 1924, filino de Frank Hall kaj Constance Wyatt. La familio, kune kun fratino Sheila, translokiĝis al Ashton-in-Makerfield, Lankasiro en 1929, kiam la patro enposteniĝis kiel lernejestro tie. Tie Katelina edukiĝis, unue ĉe Liverpool College, Huyton, kaj poste ĉe la loka gimnazio.



Junaĝe ŝi ekinteresiĝis pri filatelo kaj poste pri brodado. Gimnazie ŝi koncentriĝis ĉefe pri lingvoj, studante la anglan, la francan, la latinan, sed ankaŭ historion. En tiuj jaroj ŝi unue provis aktori – pasio, kiu daŭris la tutan vivon.

Katelina studis la francan ĉe St. Hilda’s College, Oksfordo de 1942 ĝis 1944. En plena milito, ŝi volontulis por kromaj taskoj: ŝi helpis homojn viziti infanojn en hospitalo, kaj observadis kontraŭ fajro.

Pro la milito, al ŝi tiam ne estis eble fini la studojn, kaj en 1944 ŝi eklaboris ĉe la Ministerio pri Provizado en Londono. Dum semajnfinoj kaj ferioperiodoj ŝi faris laboron ĉe bienoj.

rimarkinte ŝian ankoraŭ viglan partoprenon, prave priskribis ŝin kiel “modelan dumvivan lernanton”. Ankaŭ pro ŝia dumviva entuziasmo,

kaj kapablo vigligi aliulojn, ŝi ege mankos al ni. Ni kondolencas edzon Ernest, filonon Mary, familianojn kaj amikojn. ■

Reveninte al Oksfordo en 1946 ŝi finis siajn antaŭajn studojn, magistriĝis, kaj komencis doktoriĝan programon. En 1952 ŝi fariĝis helpantino pri la angla ĉe la École Normale d'Institutrices en Angoulême, Francio, kaj en 1953 finverkis sian doktoriĝan tezon *Enkonduko al la filozofiaj diskursoj de Pontus de Tyard*, 16-jarcenta episkopo.

Ŝia universitata kariero komenciĝis en 1953, kiam dum du jaroj ŝi estis komenca lekciisto en la fako pri la franca ĉe Queen's University, Belfasto. En 1955 ŝi translokiĝis al Southampton, kie ŝi restis dum 30 jaroj ĉe la tiea universitato, ĝis emeritiĝo en 1985.

Esperanton ŝi unue renkontis en 1973. Baldaŭ post la eklerno ŝi fariĝis kutima partoprenanto kaj instruisto ĉe la ĉiujara Somerlernejo ĉe Wedgwood Memorial College en Barlastono. Ŝi multe interesiĝis pri poezio, aktorado kaj verkado. Post emeritiĝo en 1985 ŝi fariĝis sekretario de la Norviĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo (NoJEF) – posteno, kiun ŝi tenis dum 30 jaroj

– kaj en 1992 fariĝis redaktoro de *La Afrika Reto*, kiu celis afrikajn esperantistojn, kiuj interesiĝas pri beletra komponado. Ses eldonojn ŝi redaktis, ĝis emeritiĝo en 2005.

Tiajn voluntulajn postenojn ŝi tenis ne nur en Esperantujo, sed dum la tuta vivo en diversaj aliaj fonoj. Jam en la bazlernejo ŝi helpis

sian patrinon kun laboro por *Church Mission Society*, kiun ŝi ankaŭ reprezentis ĉe universitato kaj kies sekretario ŝi fariĝis dum la labora vivo.

Iam ŝi estis kasistino por *Alliance Française*, pro kiu laboro ŝi ricevis tra la



Reĝino la titolon *Chevalier de l'Ordre des Palmes Académiques*. Ja prestiĝa titolo, sed Katelina neniam parolis pri ĝi, tiel ke la familio nur eksciis jardekojn poste, kaj nur trovis la rubandon je la lasta translokiĝo; Katelina konservis ĝin en la ŝtrumpetkesto.

En 1986 ŝi post emeritiĝo translokiĝis al Oksfordo kaj alprenis pli da respondecoj, interalie kasistino de la Religia



Kate festas sian 90-an datrevenon.

Dramsocieto de Britio, kasistino kaj bibliotekistino de la Oksforda Esperanto-Societo, kaj oficistino por la poŝtmarka ofico de *Church Mission Society*, kiu akceptis kaj revendis uzitajn poŝtmarkojn. Eĉ sekretario de la Grupo por Aĉetantoj en Oksfordo ŝi fariĝis, je granda miro de sia multjara pastro, Bruce Gillingham, kiam li eksciis; kiel ĉiu alia membro de la eklezia rondo, li sciis, ke Katelina tute ne estis elspezema, kaj ŝercis, ke li dubas, ĉu ion ŝi iam ajn aĉetis.

Katelina konservis sian amon por aktorado kaj verkado eĉ kiam ŝi eniris sian grandan aĝon. Okdekjara ŝi daŭre asociiĝis kun la Religia Dramsocieto kaj publikigis siajn poemojn, ekzemple la kompilaĵon *Autumn Heart and other*

compilations en 2012, kiam ankaŭ aperis kelkaj ŝiaj tradukoj en *Star in a Night Sky*. Tiuj sekvis la poemaron *An Odd Kind of Courage* en 2007 kaj la kritikan studon *Rabelais: Pantagruel and Gargantua* en 1991.

Post longa malsano Katelina mortis, pace, dumdorme. Ŝi estis ekster vido sed ne penso. Loka esperantisto Jens Spillner vizitis ŝin ne longe antaŭ la forpaso kaj povis teni ŝian manon. Dum kelkaj jaroj Heleno Fantom montriĝis vera amikino per plurfoja vizitado.

La memoriga ceremonio por Katelina okazis la 17-an de decembro. Parolis nome de Esperanto Jens Spillner kaj Maciej Mirnowicz, la flegisto de Marjorie Boulton, kiu ĉeestis kiel ankaŭ Tim Owen, reprezentante EAB kaj NoJEF.

La kuratoroj de NoJEF, agnoskante la plurjardekan kontribuadon de Katelina al tiu bonfara asocio kaj al Afriko, decidis donaci monon en ŝia memoro por subteni la unuan Internacian Junularan Kongreson okazontan en Afriko. Tiu donaco, donita en la nomo de EAB, ebligos al junulo de najbara lando ĉeesti la aranĝon senpage. Sendube tiu gesto plaĉus al tiu karmemora virino, kiu vivis digne kaj kristane. ■

Strangaj kuraĝuloj

Mi estas unu
el tiuj strangaj viroj,
kiuj sin klinas
kun varmoplenaj miroj

al flavaj paĝoj
de flavaj artvolumoj
sen zorg' pri tio,
ke dume mortaŭtunoj

vualas ĉion ...
Ĉu ie sonas krioj?
Ĉu pleb' frenezas
sub siaj histerioj?

La Mondo falas?
Negrave! Ni ne timas!
Al niaj paĝoj
ni nin plu mute klinas;

ĉar ni kredegas,
ke pro ĉi tiuj klinoj
la Mond' neniam
sin finos en ruinoj ...

Kaj se la Morto
ĉi tien mem nun venus,
ni seĝon montrus,
kaj Ĝi la lokon prenus!

Kaj ĉe ĉi tiuj
malnovaj grizaj libroj
Ĝi kun ni sidus
kun samaj sanktaj vibroj,

En 2007 **Katelina Halo** publikigis poemaron *An Odd Kind of Courage*. La titolo venis de la traduko, kiun ŝi faris, de *Strangaj Kuraĝuloj*, poemo de la ĉeĥa poeto kaj verkisto esperantista Karolo Piĉ. Jen la originalo kaj la traduko de Katelina.

kaj Ĝi eĉ cedus ...;
ĉar ĉiu ties vorto
estas potenco
kaj vivo kaj malmorto.

Kaj ne armiloj,
sed libroj kaj volumoj
savos la Mondon
plorantan en mallumoj.



Yes, I am one
of that odd collection
who bend their heads
in awed affection

over the pages
of yellowed tomes,
not caring if death
like autumn comes

to shroud the world ...
did we hear a shout?
a mob gone mad
in hysteric rout?

a world in ruins?
no need to worry!
over the page we
bend further, dumbly;

for we believe
that thanks to our bending
the world will never
come to an ending;

that if Death came
at our books to find us,
we'd point to a chair,
he'd sit beside us,

over the books
all grey with dust
he'd sit to share
our holy lust,

he would surrender ...
for dead poets' breath
is life and power,
and death to death.

For it's not weapons
but words and writing
will save the world
in the darkness crying. ■

Perpoŝte



Saluton, redaktararo de *LBE*!

Multan dankon pro la bonega aŭtuna numero, kiun mi ĵus sukcesis finlegi.

Evidente, pro diversaj cirkonstancoj tiu numero iĝis granda defio, sed vi brile venkis, produktante belaspektan revuon kun interesa enhavo. Vi tute taŭge honoris la memoron al Paul Gubbins, ne nur per la nekrologaj tekstoj kaj bildoj mem, sed ankaŭ per la altnivela daŭriga laboro rilate la revuon.

Dankon denove, kaj plej bonajn dezirojn por estontaj numeroj!

Malcolm Jones

La trihoma skipo malantaŭ la lasta *Brita Esperantisto*, post sia unua provo kunprodukti ĝin, tre fieris neatendante ricevi pozitivajn reagojn de kelkaj legantoj.

Karaj,

Dankon pro la plusendo de la nuna numero de *La Brita Esperantisto*. Mi opinias ĝin tre riĉa, interesa, bele enpaĝigita, ĝis tiu grado, ke mi vere tre ŝatus havi ankaŭ paperan version de ĝi. Ĉu eblas? Se necesas pagi la kostojn, bonvolu indiki tion.

Mi ne memoras, kiam mi lastfoje havis emon legi iun Esperanto-revuon de komenco ĝis la fino.

Amike,

Katalin Kováts

Karaj amikoj,

Mi legis la tutan *Britan Esperantiston* de kovrilo al kovrilo kaj trovis ĝin vere interesa kaj bone redaktita. Fininte instrui ĉe la sesio *Lernu Plu*, mi ĝuis legi pri la antaŭa kaj ankaŭ legi la komentojn de homoj, kiujn mi mem ĵus instruis.

La artikolo pri Harold Bolingbroke Mudie fascinis min kaj trafis la ĝustan longecon. Aperis en ĝi la ĝusta kvanto da informoj por igi la artikolon informa sed ne enuiga. Gratulojn do pri la artikolo kaj la tuta eldono!

Plej bonajn dezirojn,

Anna Lowenstein

Bildbabile

Ne tiom maloftas kafejoj kaj restoracioj, kiuj uzas la nomon “Esperanto”. Eĉ regule kunvenas en unu la Liverpoola Esperanto-Rondo. Sed ja treege maloftas, ke la posedanto uzas ne la nomon, sed donas al la ejo plenan aspekton Esperantan, kiel ĉe tiu ĉi vegana kafejo en Japanio.



Esperanto menciigis la 20-an de novembro en la televidsendo *The Chase*. La ludanto devis elekti la ĝustan respondon al la demando “Kiom da literoj konsistigas la esperantan alfabeton?” Ŝi ne sciis ... sed ĝuste divenis ĉiukaze!





Grietje Buttinger (p. 52) kun fiero montris al vizitantoj siajn gastlibrojn.
Dum la jardekoj ŝi plenigis kvin, rikoltante pli ol 4000 nomojn.